

pola esperantisto

socikultura revuo de
polaj esperantistoj

Fondita en 1906 • N-ro 2/2004 • ISSN 0032-2431

Krucvojo

Portas krucon Fil' de Dio.
Dorna krono sur tempio.
Mokoj, krioj de soldatoj.
Sangas Korpo pro la batoj.

Jen doloro, jen sufero,
pro la pek' de l' hom' sur tero.
Kristo niajn pekojn portas,
agonias, por ni mortas.

Ho Jesuo, ho Sinjoro,
Granda estas la doloro.
Ni pekuloj Vin adoras
kaj animoj niaj ploras.

Bogusław Sobol

2
2004

Enhavtabelo:

KOVRILPAĜE – Bogusław Sobol: „Krucvojo”.

38 REDAKTORE – Kazimierz Leja: *La nova revenas...*

39 Władysław Burszta: *Por Tago de la Patrino*.

ALIFLANKE

41 Zbigniew Galor: *Punkto. Fino!*

42 Zbigniew Galor: *AIS (-en-) Pollando*.

46 Michel Duc Goninaz: *Mi ne kutimas „protesti”*.

49 Malfermaj Tagoj de ISTK/AIS.

HISTORIE

50 Andrzej Warszawski: *La centjaraĝa revuo*.

53 Zofia Banet-Fornalowa: *La familianoj Zamenhof in Memoriam*.

57 Leszek Łęgowski: *rememore pri Józef Paweł Bieliński*.

MOVADE

58 Teresa Nemere: *Ĉu Antoni Grabowski helpos veki junularon?*

59 Jerzy A. Walaszek: *Renkontiĝo kun junaj esperantistoj en Toruń*.

LINGVA ANGULETO

16 Czesław Baranowski: *Preskaŭ ĉio pri la prepozicio AL*.

RECENZOJ KAJ LETEROJ

64 *La revivigo de Zamenhof. Recenzoj de la libro „La Zamenhof-strato” plume de: Ulrich Lins, Jorma Ahomäki, Władysław Burszta.*

68 Jerzy A. Walaszek: *„Maigret kaj la maljuna damo”*.

69 *Leteroj de: Roman Dobrzyński, Aleksander Zdechlik, Danuta Kowalska, Stanisław Mandrak.*

KOVRILPAĜE – Paweł Wimmer: *Keyman – Esperanta klavaro*.

pola esperantisto

Socikultura revuo de polaj esperantistoj, aperas 6 fojojn jare. Eldonas: Eldonejo HEJME • <http://www.hejme.e-tools.pl> • Redaktoro: Kazimierz LEJA.

Ĉiujn korespondantojn kaj kontribuojn sendu nur al la redaktoro:

**PL 41-250 Czeladź, skrytka 59; retpoŝto: esperanto@hejme.e-tools.pl.
tel: (+48 32) 265 00 38**

Jarabono enlanda: 30,00 PLN pagenda al:

BRE Bank SA-mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644.

Jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda al:

UEA-konto: <kazl-s> aŭ FEL-konto: <leja-t>

N-ro 2/2004 • ISSN 0032-2431 • Eldonkvanto: 250 ekz.

Kazimierz Leja

La nova revenas...

Tiu ĉi esprimo, konata en nia lando, multfoje rilatis al kutimoj, personoj, politikaj okazintaĵoj, ofte ne tro bone rememortaj. Jen revenis komunistoj en alikolora haŭto, „dekstruloj” kun maldekstraj programo kaj agado. Centristoj neniam estis en la centro, kaj infanoj ne tro bone jam komprenas, kiu mano esta (mal)dekstra...

Reveno ĉiam koncernas tion (tiun), kio (kiu) jam estis, tial absurdo de tiu ĉi esprimo rilatas al la najbara vorto: *nova*. Nova ne povas reveni, sed devas ekesti, komenciĝi nun aŭ estonte.

Kiam politikistoj diras, ke Pollando *revenas* al Eŭropa Komunumo, ili esprimas la konvinkon, ke ni ĉiam estis integra parto de Eŭropo. Kiam elektiĝas *novaj* estraroj ni subkoscie pensas pri tute *novaj* personoj. Sed ne ĉiam *nova* signifas *alia*.

Dum la pasinta tempo en la Esperanto-komunumo okazis decidoj kaj balotoj. En la CO de UEA denove deĵoras *novaj* oficistoj. En Pola Esperanto-Asocio ni ankaŭ havas *novan* Ĉefan Estraron, elektitan en Lodo (vidu antaŭlastan paĝon de PE). Ĉu *novaj*, kiuj *revenis*, alportos ion novan, freŝan en nian komunumon?

Ĉu oni povas esperi, ke iliaj programo, agado, laboro, refreŝigos la Movadon? Ĉu Pollando, lulilo de Esperanto, denove fariĝos rekonata en- kaj eksterlande? Ĉu estos rompita muro de silento, kvazaŭ en nia lando nenio okazas?

Por (de)nov-elektitaj estraranoj mi deziras: pli da kuraĝo, pacienco kaj persisto en organiza laboro. Ne timu serĉi novajn, modernajn rimedojn por antaŭenpuŝi la Movadon. Atenteme aŭskultu homojn, kiuj vin elektis kaj celu supren! Ne permesu, ke kiam ajn okazu miskomprenoj, speciale kiam rilatas al junularo...

Kaj por ĉiuj „simplaj” membroj de nia komunumo: nek pensu, nek kalkulu je tio, ke la Estraro laboros anstataŭ vin. Ni ĉiuj respondecas pri la estonto... *nova*.

Karaj, dum pasintaj jam Pasko-festoj, la papo denove salutis en Esperanto. Tio estu por ni, poloj, instigo ne perdi la esperon, ke Kristo resurektinta revenas *denove* en nian vivon, kiel povas reveni forta, rekonata, multnombra Esperanto-komunumo, kapabla organizi vastskale instruadon kaj gravajn internaciajn aranĝojn. Kial ne UK? 🐾

Por Tago de la Patrino

Honore al ĉiuj virinoj kaj niaj patrinoj kantis iam belege itala knabo Robertino Loretti. Lian kanzonon, tre faman kaj vaste konatan en Italio kaj eksterlande, himnon de la amo por la Patrino (verdire por ĉiuj virinoj), mi dediĉas al ili en mia Esperanta traduko.

Robertino Loretti:

Mamma, son tanto felice...

Panjo, mi estas feliĉa,
pro la reveno al vi.
La mia kanzono esprimas
plej belan songon por mi.

Panjo, mi estas feliĉa.
Mi revas ĉiam pri vi.
Panjo, sole por vi
la mia kanzono flugadas.
Panjo, vi estas kun mi,
neniam plu estos sol'

kiel mi amas vin kore
Tiuĵ-ĉi vortoj de l' amo,
kiujn flustras la mia koro,
eble ne uzataj plu.

|| Panjo, sed la kanzono
|| mia, plej bela, estas vi.
|| Vi estas vivo
|| kaj per la vivo
|| Neniam mi lasos vin! × 2

Panjo... ne plu!

Zbigniew Galor

PUNKTO. FINO!

1.

Ĉio estas sen senco! — ŝi preskaŭ kriis al aŭskultilo, kolere pensante pri esperanta aktiveco. Tio signifis: pri sia tuta ĝisnuna vivo. Verda Rozo — tiel iam iu diris pri ŝi.

2.

Ne estas malfacile rimarki, ke lo-ko, kiun okupas Esperanto en indivi-dua vivo de esperantianoj estas tre di-versa. Tute specifa okazas ĝia rolo kaze de certaj denaske parolantoj. Kutime uzataj karakterizoj: vivi/agi «por» aŭ «per» Esperanto ne sufiĉas. Oni bezonas uzi la trian difinon: vivi/agi «en» Esperanto. Tiu ĉi «en» enhavas kaj «per» kaj «por». Nur tiam eblas pli bone kompreni Verdand Rozon, kiu vivis per Esperanto por Esperanto, do en ĝi.

3.

Ŝin oni povis renkonti ankoraŭ en la pasintaj okdekaj jaroj dum plej gravaj Esperantaj aranĝoj, ĉefe en Budapeŝto. Ne, ŝi ne estas hungarino. Ŝi estas polino denaske parolanta Esperante. Kiel tio estas denaske paroli Esperante? Respondoj povas esti diversaj. Unu estas certa: male ol „nedenaskulo” „denaskul(in)o” — kiel ŝi — ne spertas malfacilaĵon ligitan kun decido unuan

fojon memstare ekparoli en Esperanto. La lingvo, kiun ŝi elsuĉis kun lakto de sia patrino-esperantistino, facile kunkreis intiman mondon de ŝia infaneco. Ŝi neniu kaze apartenis al tiuj denaskuloj, kiuj estas edukataj sen pli intensaj kontaktoj kun aliaj esperantistoj, kaj adoleskante rimarkas, ke ilia E-lingvaĵo estas ia stranga familia miksaĵo-dialekto — karikaturo de la lingvo. Ŝi bele parolis tiu ĉi lingve, ankaŭ bonege instruis ĝin.

4.

Ŝin oni edukis per Esperanto por Esperanto. Kaj tiel ŝi vivis ĝis nun. Esperantujo iĝis ŝia vera patrujo kaj ekstis por ŝi en fizika, geografia formo, antaŭ ĉio, kiel ĉefurbo de Hungario. Tie dum la lastaj sepdekaj kaj okdekaj jaroj estis unu el la plej gravaj centroj de Esperanta movado. Ŝi sindediĉe popularigis lingvon de Zamenhof. Neniu ero de ŝia ekzisto estis libera de la lingva influo. Portis vestaĵon riĉe ornamitan per E-simboloj. Tiel aspektis esprimo de la spirito amanta la lingvon, Esperantujo kaj atendanta reciprokita amon flanke de la mondo.

5.

Kabei — laŭ PIV — tio agi kiel Ka-

be (pseŭdonomo de K. Bein, pola leksikografo kaj tradukisto), kiu estante tre vigla esperantisto, subite kaj tute ĉesis verki en Esperanto. Unu el la kantoj de Georgo Handzlik nomiĝas: *Kabejĝos iam mi...*

6.

Sorto de la Verda Rozo montras eb-lajn rezultojn de tia esperantista edukado de denaskuloj, kiu instruas ilin vivi n u r en Esperantujo. Ekstere de ĝi ili iĝas senarmilaj, malheroaj en la mondo danĝera kaj kruela. Tio malebligas eviti la demandon pri rolo kaj kunrespondeco de la esperantista medio en subtenado pere de ĝia ideologio kaj praktiko similajn sintenojn kaj rezultojn. Kolapso de berlina muro influis esencajn ŝanĝojn de la Mez-orient-

Eŭropa Esperantujo. Ili — kvazaŭ tertremo — ruinigis ankaŭ ĝisnunan hungaran budapeŝtan Esperantujon. Por Verda Rozo tamen malaperis definitive Esperantujo mem — unu nura mondo, en kiu ŝi sentis sekure kaj digne. Tiel estis ankoraŭ en „Esperejo” — E-klubejo apud stacidomo Keleti, kie mi vidis ŝin lastfoje, mallonge antaŭ fermo de la klubejo.

7.

Dum telefona interparolo neniaj argumentoj atingas ŝin. Instigata far geamikoj plu okupiĝi pri esperantaj aferoj ekz. interrete, nervoze respondas: Pri kio mi skribu? Pri fekaĵo de mia hundo? Pri malespera senlaboreco? Lasu min en paco! Punkto. Fino!

☐

Zbigniew Galor

AIS (–en–) POLLANDO

Tri okazintaĵoj: ➤ la 5a datreveno de AIS–Pollando (pasis pasintjare), ➤ la 15a datreveno de la unua pola AIS sesio ĉi–jare, kaj ➤ Ĝenerala Kunveno de AIS–Pollando, kiu okazos la 2an de majo en Bydgoszcz, favoras prezenti pli proksime la agadon de AIS en Pollando.

La Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) en San Marino ekestis en 1985*. De sia komenco ĝi estas ligita kun agado de sia nuntempa prezidanto — prof. Helmar Frank. De tiu ĉi tempo AIS kreas neordinaran fenomenon

sur la mapo de la Esperanto–movado. Kvankam funkciado de asocioj esperantistaj–sciencistaj apartenas al la tradicio de la E–movado, AIS tamen iĝis io multe pli ol ili. Ĝi formas organizon, kiu kunligas scienc–didaktikajn

kaj kulturajn celojn karakterizajn por altlernejoj. Kiel *libera, scienca institucio* AIS celas *plenumi en internacia kaj interfaka kunlaborado ajnajn laborojn ...tipajn por universitatoj kaj akademi-
oj*; strebas al *plureco*; substrekas *objektivecon* kaj sendependecon de scienco; konsciiĝas pri la *grava rolo de lingvo por la sciencaj pensado kaj komunikado*, kiun oni ligas kun Esperanto kiel neŭtrala internacia lingvo — „ILO”**. En la Akademio oni povas studi, akiri sciencajn titolojn, trovi fakajn kontaktojn. La Akademio konsistas el 6 Sekcioj (fakultatoj): 1) Kibernetika; 2) Humanistika; 3) Strukturscienca; 4) Filozofia; 5) Naturscienca; 6) Morfoscienca.

1. Antaŭ la fondo de AIS–Pollando

Sanmarinecaj Studadsesioj (SUS) de AIS San–Marino regule okazas en landoj, kie ekzistas aktivaj centroj de la Akademio. Sisteme — principe ĉiun duan jaron — okazas tia SUS en San Marino („San Marineca Univeristata Semajno”). Krom SUS kaj „prov–SUS” oni organizas ankaŭ aliajn studadsesiojn, kiuj — nomataj Universitataj Sesesioj — ne enhavas universitatajn ekzamenojn kaj pro tio ne estas titolitaj SUS. Indas rimarki, ke rezulte de praktikaj bezonoj ekz. en Bydgoszcz evoluis „BUS” — bakalaŭriga sesio kun bakalaŭrigaj ekzamenoj.

Komencoj de AIS en Pollando estasigitaj kun agado de prof. Tyburcjuŝ Tyblewski. Li, estante ankaŭ senatano de AIS, organizis la unuajn polajn se-

siojn kaj tre subtenis la sekvaj.

Programo de la Dua Univesitata Sesio en Krynica (17–30.05.1989) povas doni imagon pri la unuaj universitataj sesioj de AIS en Pollando Ĝi enhavis 4 ok–horajn kursojn finiĝantajn per ekzameno: ➤ komputikan — *Dialoga diskedtipografio* (OProf. d–ro Kurd Alsleben & ADoc. mag. Antje Eske–Alsleben); ➤ informaciteorian — *Informaciteorio en psikologio kaj klerigscienco* (OProf. d–ro habil. Helmar Frank); ➤ lingvistikan — *Lingvo kaj socio* (Adoc. d–ro Michel Duc Goninaz); ➤ kurson pri turismo — *Socia fono de internacia turismo; Reguloj de afekciado en turismo* (PDoc. d–ro habil. Tyburcjuŝ Tyblewski). Krome estis en la programo 2–horaj prelegoj prezentitaj ankaŭ far aliaj sciencistoj: PDoc. d–ro habil. Krystyna Kauffmann, Doc. d–ro habil. Władysław Maria Grabski, D–ro Tatjana Nikoŭajewna Bockova, D–ro Tadeusz Ejsmont, D–ro Zbigniew Galor, D–ro Włodzimierz Opoka. En arta–kultura parto de la sesiaj prezentoj ni trovas nomojn de: Jerzy Handzlik, Lidia Ligeza, Luisa Marin, Tamara Roszak, E. I. Serejo, Urszula Zybur. La sesia programo enhavis ankaŭ: seminariojn por magistrokandidatoj kaj por doktorkandidatoj. Sekretario de la sesio estis mag. inĝ. Jan Talik.

Ĝis la fondo de AIS–Pollando (en 1998) diversaj AIS–sesioj okazis ankaŭ en Krakovo, Poznano, Bydgoszcz, Staszów.

De la jaro 1990 Bjalistoko iĝis sidejo de la unua pola AIS–Filio, kie

aktive agis mag. Jarosław Parzyszek. Fondo de filio estis rezulto de kunlabora kontrakto inter Teknika Universitato en Bjalistoko kaj estraro de AIS. Organizaj — ĝis fine ne klarigitaj — malfacilaĵoj rompjis subite post kelkaj jaroj sukcese komencitan funkciadon de la filio.

Samtempe plifortiĝis pli fruaj kontaktoj de prof. T. Tyblewski kun Studumo pri Turismo kaj Kulturo de „Monda Turismo” en Bydgoszcz, kies prezidanto estis mag. Andrzej Grzębowski. Tio algvidis al fondo de AIS Klerigejo pri Turismo kaj Kulturo la 4an de majo 1996. La statuso de AIS–klerigejo ebligis organizadon de regulaj AIS–studoj kune kun Bakalaŭrigaj Universitataj Sesioj. Direktoro de la studumo estis mag. Tomasz Kudrewicz.

2. Fondo de AIS–Pollando

En la sama 1996 jaro, sed pli frue (27.01.), en Teknika Universitato en Poznań (kie gastiganto estis prof. Stanisław Jarmark) okazis fondkunveno de AIS–Pollando, kiun ĉeestis ankaŭ profesoroj Frank kaj Tyblewski. La partoprenantoj elektis 4 personan Fondan Komitaton: ADoc. d–ro Zbigniew Galor, mag. Tomasz Kudrewicz, s–ro Zbigniew Kornicki, mag. Zbigniew Rosiak.

Post pli ol du jara atendado juĝejan decidon (periodo ne libera de bariroj starigataj flanke de juristoj, finlaste superigitaj dum kunveno de la membroj–fondantoj en Bydgoszcz, 1.05.1998), la 17.08.1998 en Poznana

juĝejo estis registrita AIS–Pollando, kies plena nomo estas: „Polskie Towarzystwo Międzynarodowej Akademii Nauk (AIS) w San Marino” [Pola Societo de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) en San Marino”].

La 26.09.1998 dum ĝenerala kunveno en Poznań oni elektis estraron de la AIS–Pollando: prezidanto — Zbigniew Galor, vicprezidanto — Jerzy Lechowski, sekretario: Zbigniew Kornicki, trezoristo — Irena Jaworska–Marcinkowska, revizia komisiono: Tadeusz Chrobak, Lidia Ligęza, Urszula Piątek.

Malfacilaĵojn lititajn kun registro de AIS–Pollando en Poznań plifortigis aparta iniciato de Wojciech Soczówka, kiu en 1997 en Varsovio registris similan organizon, agente sen iu ajn kontakto kun Fonda Komitato. La varsovia organizo neniam komencis agi.

3. Ĝisnuna agado de AIS–Pollando

Ĝisnuna agado de AIS–Pollando estis plie individua agado de ĝiaj membroj ol ilia komuna organiza. Temis pri ligiĝo de kelkaj membroj kun AIS–Klerigejo en Bydgoszcz (ĝis kolapso de la „Monda Turismo”).

La statutaj celoj de la Pola Societo de AIS (AIS–Pollando) kiel *memstara organizo peranta* inter AIS kaj polaj institucioj kaj scienc–eduka medio, rilatas ĉefe al: apogado fondi AIS–filiojn, akcepton de AIS flanke de polaj sciencaj institucioj kaj iliaj individuaj reprezentantoj, reciproka agnosko de sciencaj titoloj kaj diplomoj pere de AIS kaj

tiuj institucioj; faciligado de internaciaj sciencaj kontaktoj pere de Esperanto.

Sur la mapo de pola E-movado akademias, universitataj centroj estas tre malmultaj. Gravas tamen ankaŭ laŭ kiuj kriterioj ni rigardas la mapon. Ĉu laŭ gvidataj kursoj de Esperanto, ĉu laŭ nombro de akademias sciencistoj-esperantistoj; ĉu laŭ gvidataj studoj pri/per Esperanto. La akademias mapo de esperantista aktivado estas tamen pli riĉa ol reto de akademias membroj de AIS-Pollando. Do oni ne atingis ĉiujn akademianojn-esperantistojn — potencialajn kandidatojn de AIS.

Nuntempe, al plej signifaj Esperantaj punktoj de la pola akademias medio apartenas Poznano, Krakovo, Bydgoszcz kaj Lublin. Nun la agado en Lublin plifortiĝas dank' al la agado de prof. Witold Stępniewski — vicrektoro de la Teknika Universitato en Lublin, kie okazos laŭ la planoj en septembro BUS. Ekde kelkaj jaroj Esperanto estas instruata en la universitato far Tomasz Chmielik en oficialaj kadroj de lingvo-instruado. Ankaŭ en Katolika Univer-

sitato Lublina (KUL) laboras esperantisto, d-ro Maciej Ziembra.

La 2an de majo okazos en Bydgoszcz Ĝenerala Kunveno de AIS-Pollando, decidis pri direktoj de agado, elektos novan estraron. La kunveno donos ankaŭ malĝojan okazon rememorigi ĉiujn membrojn de AIS-Pollando, kiuj dumtempe forpasis. Apartenas al ili gekolegoj: Antoni Golonka, Tomasz Kudrewicz, Ryszard Kwarcianny, Barbara Laskowska, Edward Miszurow, Zbigniew Rosiak, Jan Talik, Tyburcjusz Tyblewski. Malgraŭ nuntempaj malfacilaĵoj eblas kontinui iliajn strebojn, kiuj baziĝas sur konvinko pri graveco de la Esperanta agado en pola akademias medio pere de AIS. ❄

* Bazaj informoj en: R. Fössmeier, Helmar Frank: *AIS. La Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino. Die Internationale Akademie der Wissenschaften San Marino*, Eld. Akademia Libroservo, Institut für Kybernetik, Berlin & Paderborn, 2000.

** Laŭ la *Deklaracio de San Marino* el 3.09.1999 en la supra verko, p. 67-69.

De prezidantino de la pola sekcio de ILEI Maria Majerczak ni ricevis la subajn informojn:

1. Senpagaj abonoj de E-gazetoj.

— *Internacia Pedagogia Revuo* por ĉiu pola esperantisto kiu deziras legi ĝin,

— *Internacia Pedagogia Revuo* por reprezentantoj de E-klubo,

— *Juna amiko* nur por personoj kiuj nun instruas Esperanton en Pollando.

Bonvolu kontakti la prezidantinon: Maria Majerczak tel (12) 638 14 49.

2. La plej novaj Esperantaj vortoj.

Se vi deziras ekkoni la plej novajn vortojn en Esperanto ne troviĝantaj ankoraŭ en vortaroj rilatantaj al nuntempo (i. a. multajn detalojn pri komputilo kaj interneto) abonu kvaronjaran revuon *Juna amiko*, kontraŭ 34 PLN por la jaro 2004.

Monon bonvolu sendi al:

Magdalena Tata, 32-020 Koźmice Wielkie 323 k/Wieliczki

Michel Duc Goninaz:

MI NE KUTIMAS „PROTESTI”

MONOLOGOJ
KONTROLATAJ

➤ Mi? Bone, mi diros. Naskita la 6an de septembro 1933 en Parizo. Esperanton mi lernis ekde la jaro 1946 en gimnazio. Post studado en la Pariza Instruista seminario (École Normale d’ Instituteurs), mi studis ekde 1954 en la Supera Pedagogia Instituto (École Normale Supérieure) kaj en Sorbono la francan filologion kaj literaturon kaj komencis studadon de la rusa lingvo, por kiu mi poste fakiĝis. En 1956–57 mi studis en la Moskva Universitato. Mi instruis la rusan lingvon unue en mezlernejoj Parizregionaj kaj ekde 1967 en la Universitato de Provenco (Aikso) ĝis mia emeritiĝo en 1996. Ankaŭ esperanton mi instruis en la sama universitato de 1970 ĝis 1996. Kiel sciante, mia ĉefa laboro sur la esperantologia tereno dum la pasinta jardeko estis la revizio de PIV.

➤ Vi demandas, ĉu ni ne tro frue finis la multjaran redaktadon de nova PIV — ja estas multe da korektoj diskutataj en la reto? Mi rakontis en la Antaŭparolo de la nova PIV, en kiaj cirkonstancoj mi akceptis zorgi pri la revizio. Mi ne volis rifuzi la taskon, kiun proponis al mi la Plenum-

Komitato de SAT, tiom pli, ke ankaŭ Waringhien insistis, ke mi akceptu. Estas vere, ke ni povintus daŭrigi la poluradon de la nova PIV dum kelkaj pliaj jaroj. La lasta korektado estis farita de ĉirkaŭ dudek personoj, sed tiu definitiva teksto estis relegita de ili nur unu fojon. La korektoj, kiujn ni nun preparas por reta diskonigo kaj por plibonigita dua eldono, ne koncernas speciale iun fakon. Multaj estas pure teknikaj (tajperaroj), aliaj koncernas kelkajn malĝustaĵojn aŭ celas plibonigi iujn difinojn.

➤ Kontaktoj kun polaj esperantistoj? Miaj personaj kontaktoj kun esperantistoj en Pollando komenciĝis en 1955, kiam mi partoprenis la Mondan Festivalon de Junularo kaj Studentoj en Varsovio. La esperantistan renkontiĝon de la Festivalo partoprenis ĉirkaŭ 150 homoj. Tiuokaze mi konatiĝis i.a. kun mia kara kaj bedaŭrata amiko Tadeusz Michalski, tre kompetenta leksikografo. Mi volas menci i ankaŭ mian karan amikon, ankaŭ malaperintan, Jerzy Grum, kun kiu mi konatiĝis, se mi ne eraras, dum la Varsovia Universala Kongreso de

1959. Poste mi sufiĉe ofte vizitis Pollandon, kelkafoje por kialoj sen rilato kun esperanto (ekz. 1973, kongreso de slavistoj en Varsovio; 1982, vojaĝo ligita kun la tiamaj okazintaĵoj; 1988, turisma vojaĝo), sed plej ofte por partopreni en diversaj esperantistaj aranĝoj, precipe en kelkaj sesioj de la Sciencaj Interlingvistikaj Simpozioj, kiujn organizis Ryszard Rokicki en apud-varsoviaj lokoj kaj en kursoj de AIS, kiujn organizis mia bedaŭrata amiko Tyburcjusz Tyblewski en Krynica kaj aliaj lokoj. Kun Jerzy Leyk mi konatiĝis en 1984 okaze de simpozio pri la strategiaj problemoj de la Esperanto-komunumo. Sed mi devus menciigi multajn aliajn personojn, nepre litigitajn por mi kun la esperantlingva kulturo, ekzemple Zofia Banet-Fornalowa, Jerzy Fornal, Lidia Ligęza, Jadwiga Dzięgielewska...

➤ Ĉu la Esperanto-movado estas en krizo? Mi ne estas kompetenta por analizi la t.n. „Esperanto-movadon”. Necesus unue ĝin difini. Probable sociologo povus pli bone ol mi respondi al tiu demando. Mi havas la impreson, ke la Esperanto-movado estas en krizo de post sia naskiĝo. Se temas pri la internaj problemoj de iuj organizaĵoj, mi ne opinias, ke tio povas misinflui la tutan esperantistaron. Se temas pri la fakto, ke multaj novaj esperanto-uzantoj ne emas partopreni en la tradiciaj asocioj, mi dirus, ke tio estas grava fenomeno, antaŭvidebla jam de kelkaj jardekoj. Sed probable tio estas komenco de nova epoko, kaj mi vidas

nenian kialon por pesimismi. Mi precipe ne vidas kialon por imagi, ke iu jam elpensita nova organiza formo povus stafeti en tia evoluo. La novaj manieroj lerni kaj uzi nian lingvon probable naskos, preter la normala nuna individuismo, novajn formojn de homgrupiĝoj kaj kolektivaj agadoj, pri kiuj oni ne povas ukazi. Sed mi opinias, ke la t.n. „fakaj asocioj” devas zorgi ne nur pri sia pluekzistado, sed eĉ pri sia disvolviĝo, ĉar ili ludas gravan rolon en la konkreta uzado de la lingvo kaj en la evoluigo de ĝiaj fakaj terminaroj.

➤ Ĉu esperanto povas esti (la?) lingvo de EU? Evidente ne, laŭ mia prognozo. EU estas kreaĵo de ŝtatoj, kun ĉiuj konsekvencoj de tiu situacio, interalie la daŭrigo en ĝi de la lingvobatalo kaj de la lingva imperiismo. Esperanto estas lingvo ne „internacia”, malgraŭ tiu ŝablona etiketo, kiun donis al ĝi ties aŭtoro kaj la ĉi-supre aludita „Esperanto-movado”. Ĝi estas lingvo „sengenta kaj neŭtrale-homa”, kiel Zamenhof preferis ĝin difini. Ĝi estas lingvo destinita al la Bjalistokanoj de la Zamenhofa epoko kaj konsekvence al ĉiuj homoj, ĉar multegaj lokoj de la nuna mondo estas bjalistokoj. Kredi, ke esperanto povas iel „venki” sen gravegaj revoluciaj ŝanĝoj en la sferoj ekonomia, socia, politika, estas naive.

➤ Kian demandon mi ne volus ricevi en iu ajn intervjuo kun mi kiel esperantisto? Oni povas fari al mi ĉiajn ajn demandojn. Al iuj mi eble ne respondos, ekzemple se mi ne kompetentas, aŭ se tio tuŝus aliajn personojn. Vi de-

mandas, kial mi ne protestis kontraŭ la politika neŭtraleco de UEA. Nu, mi ne kutimas „protesti”. Protesti signifas, ke oni ankoraŭ ion atendas de la instanco, kontraŭ kiu oni protestas. Sed tio ne signifas, ke mi rilatas indiferece al la historio kaj ideologiaj tendencoj de la esperantistaj organizaĵoj. Vi povis konstati, ke en artikolo, kiun mi verkis por *Sennacieca Revuo* antaŭ pli ol jardeko kiel komenton al *La danĝera lingvo* de U. Lins, mi analizis tre kritike la malneŭtralecon de la esperantistaj organizaĵoj, kiuj paradas per sia „neŭtraleco”. La logika kaj honesta neŭtraleco postulas, ke iu asocio ne esprimu opiniojn pri aferoj, en kiuj ĝi laŭstatute ne kompetentas. Asocio de astronomoj ne devas havi religian tendencon kaj religia asocio ne devas esprimi opiniojn pri astronomiaj problemoj. En la „Esperanto-movado”, nur la Akademio estas neŭtrala pri ĉio, kio ne koncernas la lingvon mem. La diversaj asocioj ne ŝajnu, ke ili estas neŭtralaj; kiam ili uzas argumentojn por propagandi la lingvon, tiuj argumentoj laŭdifine ne estas neŭtralaj. Kiam la gvidantoj de UEA amindumas kun UN aŭ diversaj registoj (ni memoru ekzemple, ke la hispana ĉefmurdisto Francisko Franko estis „protektanto” de la Madrida UK en 1968), ili rompas la proklamitan politikan neŭtralecon de la asocio. Sed se en iu ajn esperantista asocio aŭ grupo, kies celoj rilatas al kulturo kaj al internaciaj rilatoj, oni malpermesas al la membroj debati pri politikaj proble-

moj sub preteksto de „neŭtraleco”, tio ne plu estas neŭtraleco, sed tabuo kaj limigo de la esprimlibereco. La koncepto „neŭtraleco” estas do, en la tiel nomata „neŭtrala” Movado, ofte uzata inverse kaj hipokrite. En la ĉi-supre aludita artikolo, mi esprimis la paradokson, ke SAT estas pli neŭtrala ol UEA, ĉar en ĝiaj kongresoj oni ne vidas ministrojn aŭ ambasadorojn, kaj ke interne de SAT, kiu estas plurtendenca, la plej neŭtralaj estas la anarkiistoj, ĉar ili subtenas neniun ŝtaton aŭ politikan partion. Probable tiu ŝajne iom stranga vidpunkto ne estas nur mia, ĉar antaŭ kelkaj tagoj unu mia amiko skribis al mi la jenon: „mi membras nur en SAT post granda kverelo pri la manko de neŭtraleco en UEA”.

Monologon de Michel Duc Goninaz kontrolis:

Zbigniew Galor

La ILEI-Estraro decidis okazigi la ĉijaran Konferencon de ILEI en la urbo Bratislava (Slovakio) inter la 14a kaj la 21a de aŭgusto 2004.

Informoj pri la tranokteblecoj, ekskursoj, enhavo de la programo kaj aliĝilo sekvas baldaŭ en nia hejmpaĝo:

<http://ikso.net/ilei/index.php?lingvo=eo> kiun mi sugestas regule viziti por trovi aktualajn informojn pri ĉi tiu temo.

Amike,

Atilio ORELLANA ROJAS
ILEI-Sekretario

INTERNACIA STUDUMO PRI TURISMO KAJ KULTURO

KLERIGEJO de INTERNACIA AKADEMIO de la SCIENCOJ



Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo invitas ĉiujn, kiujn interesas internacia Esperanto-turismo, partopreni senpage la Ĝeneralan Kunvenon de Internacia Klubo „Esperantotur” dimanĉe, la 25an de aprilo 2004 je la horo 11.00 en Bydgoszcz.

Samtempe de 23 de aprilo ĝis 2 de majo 2004 daŭros *Internacia Kurso por E-gvidantoj*, kiu okazos kune kun la **29. Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz** kaj **25. Sesio de AIS-Klerigejo Bydgoszcz**. La aranĝoj kun loĝado dum 23 aprilo–2 majo 2004 kostos 160 eŭrojn aŭ 160 USD — eblas ricevi premion kaj per la samaj 160 eŭroj aŭ USD studi ĉe Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo la tutan monaton. Fininte maje la kurson eblas aliĝi por la dua jaro de studado de ISTK, kio kostos 300 eŭroj aŭ 300 USD.

La plej bona kursfininto ricevos senpage la tutjaran studadkotizon en Bydgoszcz por 2004/2005.

Jen la programo de malfermaj tagoj 23–25 de aprilo 2004:

29. Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz/ 25. AIS-Sesio de AIS Klerigejo Bydgoszcz (AKB)

Internacia Kurso por E-vojaĝgvidantoj 23 aprilo–2 majo 2004

PROGRAMO DE MALFERMAJ TAGOJ
(ISTK/AIS Bydgoszcz, ul. M. Skłodowskiej–Curie 10)

VENDREDO — 23 de aprilo 2004

10:00–11:30 ASci Augusto Casquero de la Cruz — „Al Español por la música”

11:45–13:15 ASci Regina Grzębowska — Kompendio por vojaĝgvidantoj

13:15–15:00 Uzado de Interreto por gestudentoj de ISTK/AIS

15:00–21:00 Adriana Witucka — Arta ceramiko

SABATO — 24 de aprilo 2004

08:00–11:00 ASci Ewa Bondar — Instruado de Esperanto laŭ Csehmetodo

11:00–17:00 OProf. Remigiusz Mielcarek — Ameriko kaj Azio

17:15–18:45 ASci Augusto Casquero de la Cruz — Hispanio en Eŭropa Unio

19:00–20:30 Moliere Duantoni Ngangu — Turismo en Afriko

DIMANĈO — 25 de aprilo 2004

08:00–14:00 AProf. Aleksandra Kowalczyk — Pritakso de bakalaŭraj kaj magistras diplomverkoj

11:00–13:00 Ĝenerala Kunveno de membroj de Internacia Klubo „Esperantotur”

11:00–13:00 Borso de E-libroj

13:15–14:45 Liu Jianguo kaj Ruan

Andrzej Warszawski

La centjaraĝa revuo

Ĉijare pasas unu jarcento de la momento, kiam manojn de esperantistoj atingis la unua numero de *Internacia Scienca Revuo*, kiu sin prezentis kiel *Monata Organo en Esperanto*. La



⇒ Liping — „Ĉinio turismo kaj kulturo”

15:00–16:30 Marcel Delforge —
Pililarĝigo de Eŭropa Unio

16:45–18:15 Mara Timermane —
Latvio en Eŭropa Unio

18:30–21:30 ASci Ewa Bondar —
Instruado de Esperanto laŭ Cseh-metodo.

Dum 26 aprilo–2 majo 2004 okazos pliaj kursoj, kies detalajn programojn ricevos ĉiuj aliĝintoj kaj studentoj de ISTK/AIS post alveno al Bydgoszcz.

DIMANĈO — 2 de majo 2004

11:00–14:00 Ĝenerala Kunveno de
Pola Societo de AIS — Prezidos ADoc.
Zbigniew Galor

14:00–17:45 Asc. Regina Grzębowska — Ekzamenoj

Pliajn informojn pri nia Centro legu ĉe nia hejmpaĝo:

www.esperanto-turismo.com

revuon redaktis Paul Fruictier kaj sur la unua loko de la listo de altaj patroj troviĝis la iniciatinto de Esperanto — d-ro L.L. Zamenhof. Sekvis lin la Franca Societo de Fiziko, la Internacia Societo de Elektristoj kaj krome pluraj profesoroj el diversaj landoj. Pri eldonado de la revuo okupiĝis konata franca firmao Hachette.

*Jen aperas pruvo, palpebla pruvo, ke Esperanto kreskas, progresas, vivas. (...) Forpasis periodo de pura filantropio; alvenas rapide tempo de praktika, de vere utila uzado de Esperanto. Tiel deklaris la redakcio en la komenciganta la unuan numeron manifesto titolita *Nia celo*. Sekve oni fiere kaj esperplene aldonis, ke la mondo, kiu mokis, kiu nin nomis utopiistoj, la mondo devos tiam penti sian propran frenezecon. Al vanaj kontraŭdiroj ni povos nun kontraŭmeti faktojn; al avidemo proponi laŭvole riceveblan profiton; al malfamaj malamikoj ni povos rebati per gloraj nomoj de nia patronaro kaj kunlaborantaro.*

La manifeston sekvis la artikolo *La scienco kaj la hipotezo* de konata profesoro pri matematiko *Henri Poincaré*. La esperantigita de *Carlo Bourlet* teksto devenis el la antaŭparolo al la pub-

likigita de Poincaré libro pri rolo de hipotezo en scienco. La aŭtoro substrekas, ke ekzistas multaj specoj da hipotezoj; ke unuj estas kontroleblaj kaj, post certigo per eksperimento, fariĝas veraĵoj produktemaj; ke la aliaj, ne povante nin enkonduki en eraron, povas utili por fiksi nian penson; ke fine aliaj estas nur ŝajne hipotezoj kaj reduktiĝas al difinoj aŭ al maskitaj interkonsentitaĵoj.

La unua numero de la revuo enhavis krome artikolojn: *Pri la malgaja estonto de la Suna Sistema de Santiaĝo I. Barbarena* (el la revuo *El Minerio Mexicano* tradukis kaj mallongigis O.W.), *Pri patogenio de ftizo kaj batalado kontraŭ tuberklozo* de d-ro R. Romme (el la revuo *Revue Générale des Sciences* tradukis H.R.), *Influo de la psika stato de l'gepatroj al formado de l'sekso de l'idoloj* (el la *Revuo de Psikiatrio, Neŭrologio kaj eksperimenta Psikologio* esperantigis A.M. Grunfeld) kaj *La fotografia rivelado* de Karlo Verks. Klare videblas, ke la redaktorado ne limigis la revuon al unu sciencobranĉo, sed strebis igi ĝin interesanta kaj leginda por vasta legontaro. Tiun ĉi impreson konfirmas fakoj titolitaj: *Kroniko, Gazetaj analizoj kaj enhavoj, Aplikata mekaniko kaj Kelkaj sciencaj vortoj*. Ili alportas diversajn informojn el pluraj revuoj sendube neatingeblaj por ĉiu leganto. En la unua numero troviĝis ankaŭ notoj pri medicinaj temoj, kies aŭtoroj estis inter alie d-ro *Leono Zamenhof* kaj d-ro *K. Bein*.

La franclingva suplemento ampleksanta mallongan informon pri Espe-

ranto, ĝia signifo kaj origino finis la unuan numeron de Internacia Scienca Revuo. Prezentitaj estis ankaŭ fundamentoj de la lingvo (alfabeto, gramatiko, vortfarado, listo de afiksoj kaj ekzempla teksto en Esperanto).

Notindas, ke jam en la tria numero de la revuo oni aperigis unuafoje la artikolon kun la sciigo *originale verkita por Scienca Revuo*. Ĝi estis la teksto de *Oliver Wood* titolita *Nuna stato de l' aviado*. La aŭtoro fine de la artikolo iom ironie konkludis: *Kian laboron havos la politikistoj, kiam la landlimoj devos stariĝi en la aero!*

Pri la problemoj de helpa lingvo estis la komuna titolo de du artikoloj, kiuj tutcerte vekis intereson de adeptoj de Esperanto. Ambaŭ plejparte ne malaktualigis, montrante, ke nunaj problemoj de internacia komunikigo samas, aŭ almenaŭ similas, al tiuj de antaŭ jarcento. En la naŭa numero estis publikigita la pretigita por l' Imperia Akademio en Vieno *Raporto pri la movado al kreado de artefarita internacia helpa lingvo* de profesoro *Hugo Schuchard*. Esperantigis ĝin *J. Schröder*. La aŭtoro konstatis, ke *neniu malkonsentas, ke la multeco de la lingvoj estas malbono por la monda interkompreniĝo kaj ke tial internacia helpa lingvo — mi ĝin nomos de nun mallonge komunlingvo — estas bezono ja kreskanta*. Kompreneble la rolon de la komunlingvo povus ludi unu el la ekzistantaj etnaj lingvoj. Tamen prof. Schuchardt substrekiis, ke *l' elekto de vivanta lingvo — sen konsiderado pri*

la neperfektaĵoj esencaj al tiuj ĉi lingvoj — produktus netoreleblan senproporcion inter la popolo ĝin posedanta kiel patrolingvon kaj la ceteraj popoloj (...) oni ne favoros inter diversaj samrajtigitaj lingvoj unu aŭ alian je kostoj de la ceteraj. La aŭtoro esprimis opinion, ke la plej signifan sukceson post Volapük prezentas Esperanto.

La Raporton de prof. Schuchard sekvis en la deka numero la artikolo *La mondlingvo* de prof. *Wilhelm Ostwald* (traduko de d-ro *Helte*). La konata sciencisto (laŭ lia propra esprimo — *fizikkemiulo*) kaj estonta Nobelpremiito substrekiis, ke la afero de internacia helplingvo tre disvolviĝas eksteren de l' filologia sfero: ĝi estas multe pli mondrilata problemo, simila je telegrafo kaj fervojoj, kiujn ambaŭ ĝi superas pro la graveco. La aŭtoro atentigis, ke neniu ekzistanta etna lingvo povas ludi rolon de monda helplingvo, ĉar la popolo, kies lingvon oni elektus kiel mondlingvo, havus pro tiu cirkostanco grandan teknikan profiton super la aliaj popoloj. Laŭ prof. Ostwald la artefaritan lingvon oni sendube povas igi pli simpla, pli logika kaj pli regula ol kiu ajn natura lingvo. Li menciis ankaŭ agadon de la *Delegacio por alpreno de Lingvo Internacia* („Délégation pour l'adoption d'une langue auxiliaire internationale”), kies tasko estis analizo de la ekzistantaj planligvoj kaj decido, kiu el ili estus ludonta kiel internacia helplingvo. En la opinio de Ostwald, cetere prezidanto de la Delegacio, elekto de la helplingvo kaŭzos, ke *tiam sentos sin*

la registaroj rajtigataj, lernigi tiun universalan helplingvon kiel instruoŝtofon en la popolaj lernejoj; kiam tiu punkto jam estos atingita, la cetero sekvos regule kaj naturnecese kaj niaj filoj aŭ nepoj uzos la internacian lingvon tiel kompreneble, kiel ni uzas hodiaŭ la fervojon aŭ la telefonon.

Mi ne intencas pli detale prezenti enhavon de la unuaj numeroj de Internacia Scienca Revuo. Ili enhavis plurajn ankoraŭ hodiaŭ interesajn kaj legindajn tekstojn. Endas tamen menciigi du polajn spurojn, kiuj troviĝas en la fako *Korespondado* en la kvara kaj sesa numeroj de la revuo. Ambaŭ estis subskribitaj A. *Grabowski* kaj koncernis lian opinion pri la proponita de d-ro R. *van Melckebeke* kaj d-ro Th. *Renard* — *Projekto de kemia nomaro esperanta*. La projekto vekis sufiĉe vastan intereson de la legantaro, kies multaj rimarkoj estis publikigitaj en la revuo. Aldonindas, ke preskaŭ samtempe, kun grava kontribuo de Antoni *Grabowski*, elformiĝis moderna nomaro de kemiaj substancoj en la pola lingvo.

Trafoliumante jam centjarajn paĝojn de Internacia Scienca Revuo oni trovas ĝin altnivela, sciencpopulariga kaj diverstema. Hodiaŭ la revuo povas servi kiel modela studobjekto por redaktoroj kaj eldonantoj, por ke rezultoj de ilia laboro estu *palpebla pruvo*, ke *Esperanto kreskas, progresas, vivas*.

La familianoj Zamenhof in Memoriam

La 30. jaroj jam dekomence ne favoris al la familio Zamenhof. Jaron post jaro forpasadis laŭvice la membroj de tiu nobla, harmonie kunvivanta familio.

En 1931 forpasis la fratino de d-ro Zamenhof, Augusta Hermelin. En 1932 d-ro Henriko Zamenhof, lia frato. En 1933 forpasis Felikso, kaj kelkajn semajnojn poste en 1934 jam la lasta lia frato Leono. Samjare Henriko Hermelin, edzo de Augusta, ŝatata bofrato, fervora apoganto de Esperanto.

La ruta familio plene konsciis pri bezono kaj valoro de homaranisma ideo kaj la Internacia Lingvo, kiel ĝian portanton — kreaĵo de L.L. Zamenhof. Prave, pri sia genia familiano la tuta familio fieris kaj laŭ ĉiuj fortoj kaj eblecoj apogis ties celadon. Kelkaj kontribuis al la Movado, malgraŭ granda profesia okupiteco kaj engaĝiĝo en problemoj sociaj kun sia laboro ligitaj. Tial iliaj forpasoj estis solene de esperantistoj funebrataj. Ili devas daŭre resti en nia danka memoro.

La plej aktivaj sur kampo de Esperanto-aktivado estis la fratoj de d-ro Zamenhof, Felikso kaj Leono. Ankaŭ Aleksandro, sed tiu lasta la plej juna tragie forpasis dum la I Mondmilito, en 1916. Estis konata lia pacifisma mondkoncepto; tial versio pri sinmor-

tigo, en ĉeesto de hombuĉado, estas plene konvinka. Henriko, la alia frato, estis rekonata dermatologo, inventinto kaj kunproduktinto de kuraciloj, krome avangarda diskoniganto de medicina scio servanta al sanigaj vivkondiĉoj, li do ne havis tempon okupiĝi pri Esperanto. Tamen liaj du filoj, d-roj: Stephen kaj Mieczysław bone konis Esperanton kaj la lasta estis tre aktiva, en la 30. jaroj, en Pollanda Esperanto-movado. Same la filino de Augusta, Emilja Hermelin, kiu same kiel Lidja Zamenhof, finis Cseh-metodan kurson kaj kvankam ne trovis tempon instrui, ŝi aktivis en la Movado kaj ofte akompanis siajn geonklojn en diversaj landaj kaj eksterlandaj Esperanto-aranĝoj.

Mi sentis moralan devon skizi siluetojn de tiuj nobluloj engaĝitaj en aktivadoj favore al socia justico. De konvinko, ke pro ilia valora kontribuo la esperantistoj ne devas pri ili forgesi fruktis monografio „La familio Zamenhof”, kiu ampleksas 15 biogramojn. Oni esperu, ke ĝi iasence kontribuos al enhejmiĝo de la familianoj Zamenhof en niaj koroj, ke ili restos en danka memoro.

La 4an de decembro 2003 pasis 70 datreveno de morto de Felikso kaj nur

du monatojn poste la 7an de februaro 1934 forpasis Leono jam la lasta frato. Ambaŭ apartenis al la piej avanaĵaj akti-vuloj de pollanda kaj internacia Espe-ranto-movado. Ilia intelekta, kultura organiza kontribuoj estas netrotakseblaj. Tial valoras iom pli vaste ilin me-morigi okaze de mortodatreveno.

Felikso naskiĝis la 6an de novemb-ro 1868 en Bjalistoko kaj de la junaĝo li estis arda apoganto de sia frato en aktivado por enmondigo de la Inter-nacia Lingvo. Post ĝia apero li evi-dentigis grandan helpon en ĝia koni-go en kaj eksterlande. Felikso okupiĝis pri administraj aferoj; pakis la Unu-an Libron kaj dissendadis ĝin, laŭ pe-ne akiritaj adresoj, al eminentaj perso-noj. Ankaŭ kun Felikso la kreinto de Esperanto povis plej frue praktiki sian eltrovaĵon. Felikso estis ankaŭ plej ver-ŝajne la unua post d-ro Zamenhof verk-into de originalaj Esperanto-poemoj. Tiuj aperis jam en la unuaj n-roj de „La Esperantisto”. Poste li publikigis plurajn aliajn en „La Revuo”, „Espe-ranto”, „Ondo de Esperanto”, „Pola Esperantisto”, subskribante ilin pseŭ-donime ‘Fez’ aŭ ‘FeZ’. Ĉiuj enhavis iun humanisman mesaĝon fontanta de lia bonkoreco. Feliĉe lia plurĝenra ver-karo estis kolektita de Edvardo Wie-senfeld kaj eldonita en 1935 de „Lite-ratura Mondo” sub titolo: „Verkoj de FeZ”. Enhavanta ankaŭ valoran „Antaŭparolon de l’ Redaktanto”. Ta-men ne ĉio, kion verkis Felikso, estis kolektita; li ja verkis ankaŭ en la pola. Temas ĉefe pri artikoloj kiujn li publi-

kigis en farmaciaj revuoj, ĉefe rilatan-taj profesian etikon. Li publikigis same en ĝeneralaj pollingvaj revuoj, konsi-derante sociajn problemojn. Felikso abunde verkis ankaŭ pollingve por in-fanoj. En Poznana Universitata Biblio-teko estis trovitaj en 1994 du kajeroj kun 17 rakontoj kaj 30 kantoj, kiun li dediĉis al siaj protektitoj - infanoj de la Orfohejmo ĉe strato Świętojserska en Varsovio. Tie li dum pluraj jaroj funk-ciis kiel prezidanto de Protekta Komi-tato. Li okupiĝis ĉi tie ne nur pri certi-go de vivkondiĉoj por la orfoj (la judaj orfohejmoj baziĝis ĉefe je filantropio), sed multe zorgis pri arta kaj spirita vi-vo de la protektitoj. Ofte li aranĝis tie teatrajn spektaklojn laŭ propraj scena-roj, kiujn li mem reĝisoris kaj al pre-zentoj engaĝigis ankaŭ siajn infanojn: Romana, Maryla kaj Julian. La infanoj el la Orfohejmo laŭbezzone ofte lin vi-zitadis hejme. Ankaŭ lia edzino Hele-na, de familio Rittenberg aktivis favo-re al la orfoj en Komitato por Helpo al Orfohejmo gvidata de Janusz Korczak. Proksimaj al lia koro estis ankaŭ blin-duloj pri kiuj li verkis, por nur men-cii lian ofte deklamatan poemon „Al blindulino”. Li kunlaboris kun UEBA — ilia asocio.

Ŝatata en landa kaj internacia Espe-ranto-movado estis Felikso ankaŭ pro sia fervora aktivado dum Espe-ranto-aranĝoj. Dum UK-oj li kuti-me aŭdigadis malfermajn paroladojn. Vere grandanimulo estis karmemo-ra Felikso Zamenhof. Lia koro ĉesis bati la 4an de decembro 1933 je la

la horo matene. Lia entombigo okazis dum pluva tago, kvazaŭ la naturo priploris la bonkoran Felikson, la 6an de decembro. Li estis adiaŭita de pluraj amikoj, kolegoj de sia profesio, sociagantoj, sed ĉefe priplorita li estis de siaj prizorgitoj-orfoj, kiujn li tre amis kaj al ili dediĉis grandan parton de sia vivo. Al la solenaĵo akompanis koruso de Varsovia Ĉefsinagogo, plenumante religiajn kantojn.*

Komence de la 1934, nova bato trafis la familion Zamenhof. La morto forprenis d-ron Leono Zamenhof, jam la lastan fraton de kreinto de Esperanto.

D-ro Leono Zamenhof naskiĝis la 31an de oktobro 1875 en Varsovio, kie li loĝis dum sia tuta laboriga vivo kaj kie li forpasis nur du monatojn post Felikso, la 7an de februaro 1934.

Li estis talentulo plurkampa. Konanto kaj ŝatanto de pola literaturo li per siaj tradukoj riĉigis Esperantokulturon per verkoj de elstaraj polaj verkistoj: „Aspazio” de A. Świątchowski, „Protesilas kaj Laudamio” de S. Wyspiański, ankaŭ per kelkaj verkoj de W. Reymont — Nobelpremiito. Leono verkis kortuŝajn poemojn el kiuj nur parto estas kolektita en „Mia libro”. Li estis ankaŭ eminenta publicisto. En siaj artikoloj konsideris ĉefe societikajn aferojn ĉiam favore al justo. Plurajn li dediĉis al etiko de sia kuracista medio. Leono distingiĝis kiel eltrovanto de kelkaj instrumentoj kaj metodoj de kuracado en laringologio. Inter pluraj liaj primedicinaj verkoj troviĝas, sistempe tre populara, pollingva: „Hi-

storio de medicino, kun biografioj, aforismoj kaj anekdotoj”. Lia publicista talento kaj altnivela intelekto plene evidentiĝis kiam en la jaroj 1908–1911 li estis ĉefredaktoro de „Pola Esperantisto”. Tiun periodon oni opinias plej brila de la revuo. D-ro Leono ne limigis sian aktivadon al la valora literatura kaj prisocia verkado. Li enkondukadis siajn ideojn en praktikon. Oni devas konsideri kiel avangardan establiton de li lernejon por surd-mutaj infanoj ankaŭ la Domon de Prizorgo por maljunaj kuracistoj.

Se temas pri Esperanto-movado li estis pleje engaĝita en gardo de Interna Ideo. Leono revis pri ekesto de Esperanto-Centro, kie esperantistoj el diversaj landoj de la mondo povus pasigi tempon en idea, samideana etoso. Tiucele li antaŭmetis al la 12a UK, 1920 en Hago proponon konstrui Esperanto-Hejmon en Svislando. Ĝi inkluzivus sanatorion kaj Esperantomuzeon. Leono mem pretis gvidi ĝin, ĝis la resto de sia vivo. La esperantistaro ne estis preta ĉi-noblan ideon akcepti. Pri ĉi-afero troviĝas informo en „Esperanto Triumfonta” (n-ro 5, 1920), antaŭanto de „Heroldo de Esperanto”. Li tamen daŭre laboris ĉikampe. En n-ro 14, 1921 de „Esperanto Triumfonta” estis publikigita esence grava artikolo, alvoko s.t.: „La korpo kaj animo de Esperanto” en kiu li konvinke klarigis, ke la lingvo estas nur korpo, kaj animo de Esperanto estas la Interna Ideo, ke ĝuste la ideo, kies celado estas konkordo estas tre grava

por la Movado.

Por disvastigi kaj enradikigi la Internan Ideon Leono iniciatis kaj kune kun la familianoj kaj amikoj fondis en 1921 Esperanto Rondon „Konkordo” en Varsovio, kaj kvankam li formale ne estis ĝia prezidanto li estis lia idea gvidanto. La ĉefdevizo de „Konkordo” estis: „Per Esperanto al Repaciĝo kaj Konkordo”. Leono, kiel dirite, estis eminenta en sia profesio kaj entute altnivela intelektulo. Li estis Lingva Komitatano kaj Membro Korespondanto de la Akademio. La grandparto de liaj medicinaj verkoj estis eldonitaj libroforme kaj ankaŭ troviĝas en faka revuaro. Lia valorega ideo kaj intelekte publicista verkaro troviĝas en vaste disjetita Esperanto-revuaro: „La Revuo”, „Esperanto Triumfonta”, „Heroldo de Esperanto”, „Literatura Mondo”, „Esperanto”, „La Praktiko” kaj en aliaj. Bedaŭrinde tiu lia Esperanta riĉega postlasaĵo ne estas ĝis nun kolektita, tiukaŭze ne vaste konata. Oni esperu, ke tio okazos. Nepras rapidi pro ĉiam pli malbona stato de la revuaro. La ideoriĉa heredaĵo de d-ro Leono bone servus al Esperanto Komunumo.

D-ro Leono mortis pro korinfarto la 7an de februaro 1934, je la 5a matene. Menciindas, ke samkaŭze mortis pluraj membroj de la Zamenhof-familio. La entombigo okazis la 9an de februaro. Li estis enterigita apud sia frato Felikso, ne malproksime de ilia frato Ludoviko. La solenaĵo estis impona. Ĉeestis amaso da eminentaj fak-

kolegoj, esperantistoj, infanoj de la lernejo por surdmutuloj, kiun li fondis, pluraj reprezentantoj de bonfaraj societoj. Estis aŭdigitaj solenaj paroladoj, dankesprimoj. La solenaĵon akompanis koruso de la Varsovia Ĉefsinagogo, plenumanta religiajn kantojn. La ceremonion gvidis, kiel ofte, Edvardo Wiesefeld. Aperis en varsovia gazetaro pluraj nekrologoj, ankaŭ memorartikoloj. Same en Esperanto-revuoj kun kiu li kunlaboris kaj ankaŭ en la aliaj.

Ankaŭ nun, okaze de la 70. datreveno de morto de Felikso kaj Leono, ŝatataj fratoj de l' kreinto de Esperanto, kolonoj de la pionira kaj intermilita Esperanto-movado nepras ilin memorigi per artikoloj, omaĝaj renkontiĝoj, kaj aparte per konatiĝo kun ilia verkaro.

Per sia idealismo kaj intelekto ili signife riĉigis la Movadon. Ni zorgu, ke ne kovru ilin vualo de forgeso.

1. En libro de Zofia Banet-Fornalowa, eldonita de kooperativo de Literatura Foiro, La ChauX-de-Fonds, 2000, troviĝas 15 biografiaj skizoj de Zamenhof-familianoj. La biografio de Felikso ampleksas 18 p, kaj de Leono 22 p. La unua represo reviziita aperis en 2001.

* La aŭtorino planas eldoni dulingve pole kaj Esperante la verkojn dediĉitajn al la infanoj de Felikso. Temas pri la poemoj, kantoj kaj rakontoj troviĝantaj en s.m. du kajeroj. Ili spegulas lian sindediĉon, bonhumoron kaj amon per kiu li pridonacis ĉiun, kiu bezonis helpon.

Józef Paweł Bieliński 1920-2004

Kiel ni jam informis, la 2an de februaro 2004 mortis en Bydgoszcz en la ago 84 jaroj kara meritplena Samideano Józef Paweł Bieliński. La funebra S-ta Meso okazis la 6an de februaro en la paroĥa preĝejo je la Dia Mizerikordo, kaj la enterigo en ĝia proksima tombejo. En Lia lasta surtera vojo akompanis multaj gesamideanoj kaj la verda Esperanta standardo.

Jen mallonga biografio de s-ro Józef Paweł Bieliński.

Jam en junularaj jaroj Li interesiĝis pri Esperanto. En la jaro 1956 Li estis kunorganizanto de Pola Esperanto-Asocio en Bydgoszcz, kaj post unu jaro la prezidanto.

Ekde tiu ĉi tempo preskaŭ ĝis la lastaj jaroj de de la vivo Li estis tre aktiva aganto specialiĝinta en la instru-kampo, aŭtoro de lernolibroj de tri gradoj por la junularaj feriadoj, gramatik-ekzercoj kaj legolibroj por ĉiuj gradoj.

En la jaroj 1977-1999 dank' al Li agis en Bydgoszcz sufiĉe multnombra grupo de esperantistoj katolikaj. Ĉiumonate okazadis S-taj Mesoj en la diversaj preĝejoj. Ankaŭ estis celebritaj Kristnaskaj kaj Mariaj diservoj (maje), aŭ intence de mortintoj novembre.

En multaj diservoj partoprenis eksterlandaj esperantistoj, precipe okaze de Esperantaj Tagoj de Bydgoszcz. Dank' al s-ro Bieliński la katolika grupo en Bydgoszcz posedas arte pen-

tritan bildon de Nia Sinjorino de la Espero, patronino de esperantistoj, kiu ĉiam akompanis dum la S-taj Mesoj.

La viv-biografio de Samideano Józef Paweł Bieliński vere estas imitinda kaj admirinda. Valoras informi, ke Li ricevis la merit-distingon de la urbo Bydgoszcz.

Ni ofte preĝe rememoru Lin. Ripozon eternan donu al Li Sinjoro kaj la senfina Lumo lumu al Li. Li ripozu en la paco. Amen.

Leszek Łęgowski
Esperanta Rondo ĉe la Vojevodia
Kultur-Centro en Bydgoszcz

La 23an de januaro 2004, post longa malsano, mortis en Koszalin apenaŭ 39-jara

Anita Nowakowska

dum dekkelkaj jaroj fakdelegito pri muziko. Ŝi aktivis ankaŭ sur junulara kampo, gvidis lerneajn kantogrupojn kaj koncertis kun ili dum en- kaj eksterlandaj Esperanto-renkontiĝoj.

Sur la tombejo oni adiaŭis ŝin esperantlingve.

Marian Łaba

En Ĉenstoĥovo ekzistas ekde 1992 jaro Ĉenstoĥova Esperanto Societo kies prezidanto estas Ireneusz Bratek.

Esperantistaj renkontiĝoj okazadas ĉiujaŭde je 16.00 ĝis 18.00 horo en la sidejo de la societo, kiu troviĝas en la fundamenta lernejo n-ro 38 je nomo de Ludoviko Zamenhof ĉe la strato Sikorski 56 en Ĉenstoĥovo, escepte de libertempoj.

Ni invitas ĉiujn gastojn!

frateto@wp.pl

Teresa Nemere

Ĉu Antoni Grabowski helpos vekojn junularon?

La 1an de marto 2004, en la plej eminenta mezlernejo en Toruń — Nikolao Kopernik liceo, okazis interesa evento: renkontiĝo de lernantoj kun esperantistaj gastoj.

La lernejo kontinuas tradicion de la iama urba gimnazio, kies abituriento estas Antoni Grabowski, konata inter esperantistoj kiel „patro de Esperanto poezio”. Ek de la jaro 1998 en la 2a etaĝo de la lerneja koridoro, ĉe la studejo por kemio, troviĝas memortabulo fondita de la nepo de Antoni Grabowski — prof. Zbigniew Kruszewski kaj malkovrita dum kunveno de diplomitoj, festantaj la 430-jaran jubileon pri la fondiĝo de la lernejo. Sur la metala tabulo estas pollingve gravurita la informo:

„En ĉi konstruaĵo dum la jaroj 1873–1879 lernis Antoni Grabowski — fidela filo de la Tero de Chełmno, eminenta kemiisto–ŝtofcoloristo,

kunaŭtoro de la pola kemia vortaro kaj kunfondito de la Pola Kemiista Societo — la patro de Esperanto–poezio, tradukinto de „Sinjoro Tadeo” kaj kreinto de la Pola Esperantista Societo”.

Kompreneble, la memortabulo vekas intereson de esperantistoj vizitantaj nian urbon. Interesaj estis du lastaj eventoj, kiuj ŝajne ebligis pli larĝe interesigi la lernejon kaj ĝiajn lernantojn pri Esperanto.

Komence de februaro 2004 vizitis la lernejon esperantista paro el Francio: la lingvisto, prof. Michel duc Goinaz kun sia edzino. La kontakto kun ili entuziasmigis la direktorinon de la liceo — s-inon Elżbieta Glura al utiligo de esperantistaj vizitoj por edukado en la lernejo.

Jam la 1an de marto en la lernejo okazis interesaj prelegoj pri la vivo kaj verko de Antoni Grabowski. Ebligis tion la fakto, ke al Toruń, pro la pre-





miera teatra spektaklo „Ĉiu havas sian monton”, prezentata de la toruna junulara teatro Studio ‘P’, venis Zofia Banet-Fornalowa — la aŭtorino de biografia libro pri Antoni Grabowski, kaj Halina Gorecka el Kaliningrado, la redaktoro de Esperanto-eldonejo „Sezonoj”, okupiĝanta precipe pri literaturo.

Zofia Banet-Fornalowa kun larĝe konata en Esperantujo entuziasmo rakontis pri vivo kaj personeco de Antoni Grabowski, kaj red. Halina Gorecka interese preparolis valorojn kaj signifon de liaj tradukoj. Specialan atenton ŝi dediĉis al la tradukita de A. Grabowski novelo de A. Puŝkin „La neĝa blovado”. Majstrecon de la traduko la redaktoroj povis admiri preparante pasintjare eldonon de la antologio

„Rusa Novelaro”, ĉar eblis aperigi la tradukon sen korektojn, kiujn bezonas la plejmulto de malnovaj tradukaĵoj. La prelegantino prezentis la libron por la aŭskultantoj.

La renkontiĝon ornamis deklamado de Jerzy Fornal — aktoro el la varsovia teatro „Espero”, kiu prezentis tradukitajn de Antoni Grabowski fragmentojn el la epopeo de Adam Mickiewicz „Sinjoro Tadeo” kaj la konatan himnon de alia fama pola poeto — Juliusz Słowacki „Mi malĝojas sinjoro”.

La lernantoj kaj ĉeestantaj instruistoj videble estis impresitaj de la tuto. Multaj el inter ili unuan fojon aŭdis pri Esperanto kaj unuan fojon aŭdis sonon de la lingvo. Oni starigis interesajn demandojn. Bedaŭrinde, ne sufiĉis tempo por pli detale paroli pri la lingvo mem. La direktorino de la Liceo deklaris pretecon kunlabori kun torunaj esperantistoj kaj organizi sekvontajn renkontiĝojn kun interesaj esperantistaj gastoj.

Ĉu Antoni Grabowski vere helpos nun vekti interesiĝon pri la internacia lingvo en sia iama lernejo?

Renkontiĝo kun junaj esperantistoj en Toruń

Dank’ al afabla invito de Teresa Neme, organizantino de amikeca kaj etosa Esperanto-renkontiĝo en Toruń — Pollando, kiu estis aranĝita la 29-an de februaro okaze de la premiera spek-

taklo de la junulara teatro Studio „P”, gastoj-esperantistoj el diversaj urboj de Pollando (26 personoj el 9 lokoj) renkontiĝis kun aktiveco de lerneja junularo kaj povis ekkoni interesajn de

la urbo. Riĉa programo komencita per vizitado en Etnografia Muzeo kaj kronita per drinkado de varmigita medo interesis kaj ĝojigis ĉiujn.

Parolante pri la matena programo, ligita kun vizitado de la regiona „skanseno” aranĝita subĉiele en la toruna urboparko ĉe Etnografia Muzeo, oni ne povas prisilenti perfektan ĉiĉeronadon de la muzeanino Maria Pokrzywnicka, permesantan reanimigi iaman vivon de vilaĝa popolo en nordaj regionoj de Pollando el la fino de la 19a kaj komenco de la 20a jarcentoj. La vilaĝa arkitekturo kun historiaj ekipaĵoj de iamaj loĝantoj rememorigis al vizitantoj, konatajn ankoraŭ de propra infanaĝo, feriadojn en postmilitaj vilaĝdomoj de praavoj. Vent- kaj akvomuelejoj, forĝejoj kaj lignaj akvo-putoj estis antaŭ kvindek jaroj ankoraŭ ofta en la pejzaĝo de polaj vilaĝoj.

Tie ni aŭdis ankaŭ mallongan prelegon de Teresa Nemere pri utiligado de Esperanto dum laboro de la Muzeo.

La vizito en la „skanseno” suplementiĝis kun vizito en historia domo-muzeo de Nikolao Kopernik, kie per „lumo kaj sono” estis rekonstruataj, surbaze de minimodela urboplano, la plej gravaj eventoj de la urbo, okazintaj dum ĝia historia evoluo. La historia spektaklo estis komentita per sonbendo esperantlingve. De la sonbendo denove ni aŭdis la voĉon de Teresa Nemere, kiu esperantigis la komenton kaj parte ĝin legis.

Ni povis nur bedaŭri mankon de

tempo por vizito en la astronomia laborejo de N.Kopernik, situita unu etaĝon pli supre en la apuda domo.

Tamen la sekva programero titolita: „Literatura Foiro”, rekomencis ĉies atendojn.

Ĝi okazis en la kafejo aranĝita en la fama toruna Oblikva Turo. Ene de la mezepokaj muroj, ĉe kandeloj, apenaŭ sufiĉis lokoj por la multnombraj esperantistaj gastoj.

Favoran atenton kaj poste varman aplaŭdon vekis la aŭtora prezentado de origina kaj traduka poezio de la krakova poetino Lidia Liĝeża. Grandan interesiĝon kaŭzis prezentitaj sekve de Halina Gorecka el Kaliningrado libro-novaĵoj, eldonitaj de la Eldonejo Sezonoj kiel: „Malvivaj animoj” de Gogol, „Blankaj noktoj” de Dostojewski, „Maigret kaj maljuna damo” de Simenon kaj eldonaĵoj de la pola Eldonejo Hejme, ne dirante pri eblecoj reaboni revuojn: La Ondo de Esperanto kaj Pola Esperantisto.

La Foiro arte ornamis per dramaĵo kaj klasika deklamado, Jerzy Fornal el Varsovio, kiu kvazaŭ volus diri: „Ho, rigardu junuloj! Jen Vi eble vidas la lastan, kiu tiel poezion gvidas!”. Senfinaj aplaŭdoj akompanis lian aktore majstran poezi-prezentadon.

Aparte estis prezentita kaj distingita de la organizantino Teresa Nemere, juna 15-jara aŭtoro de E-lernolibro „Iĝu Esperantisto”, Maciej Zgondek el Kutno. La junulo, edukita en esperanta familio, helpe de onklino, memstare pri laboris aŭtodidaktan lernolibron, kio

estas traktata kiel monda kuriozaĵo en esperantista medio. La partoprenantoj de la Foiro ankaŭ lin laŭte aplaŭdis.

La ĉeestantoj, fascinitaj de la etoso kreita en la Oblikva Turo, transiris post manĝopaŭzo al la toruna Junulara Kulturdomo, por travivi la teatran spektaklon „Ĉiu havas sian monton”, preparitan de junaj geaktoroj el la junulara teatro STUDIO ‘P’ [legu: Poezia Studio]. Tiun ĉi programeron ni ĉiuj memoros kiel „oran najlon” de la tuta Renkontiĝo.

Gravas antaŭe mencii, ke la spektaklo estis jam „baptita” eksterlande. Studio ‘P’, konata en Esperantujo pro sia moderna, matura kaj interesa teatrado sub reĝisorado de Lucyna Sowińska, estis invitita al Berlino por pliriĉigi per tiu ĉi spektaklo la artan programon de la jubilea aranĝo „100 jarojn de Esperanto en Berlin”, kiu okazis fine de novembro 2003.

Tie la internacia esperantista publiko entusiasme aplaŭdis la spektaklon.

En Toruń ni povis konvinkiĝi, ke la sukceso ne estis hazarda.

Per modesta scenografio, perfekta Esperanto en rakontado kaj kantado, utiligado de akcesora lumo kaj sono la junaj geaktoroj trafe kaj konvinke ilustris sopirojn kaj aspirojn de la nova generacio, reprezentata de la juna poeto, kiu serĉas sian lokon en la hodiaŭa mondo. Valoras substreki, ke la spektaklon observis i.a. profesia aktoro Jerzy Fornal, kiu entusiasme admiris kaj laŭdis la maturan aktoradon de gejunuloj el Toruń.

Longajn aplaŭdojn de la spektantoj haltigis Teresa Nemere, invitante al scenejo reprezentanton de Ĉefa Estraro de PEA, por tralegi kaj transdoni al la geaktoroj specialan esperantlingvan diplomon, honorigantan ilin pro lingva promocio kaj aktoreca nivelo. Denovaj aplaŭdoj finiĝis per komuna kantado de la esperigaj kantvortoj finantaj la spektaklon.

Post la spektaklo okazis diskuta renkontiĝo de interesitaj esperantistoj kun la teatra ekipo kaj ilia reĝisorino Lucyna Sowińska, dum kiu spektantoj pridemandis t.n. atelieron, programon kaj novajn iniciatojn de la teatro.

Vespera programero, okazinta en la malnova Grenejo adaptita al malnovstila restoracio, finiĝis amike ĉe kafe kaj varmigita medo (mielvino), kie dum babil-forumo estis rememorigitaj plej interesaj eventoj de la pasinta dimanĉo kaj prezentataj individuaj anoncoj ligitaj kun Esperanto-movado kiel: ITV-projekto kaj varsovia rendevuo kun Flavio Rebelo aŭ novaj eldonproponoj de Eldonejo Sezonoj k.a.

Specialan aplaŭdon kaj dankvortojn postulas bonorganize, kulture kaj promocie aranĝita programo de la Toruna Renkontiĝo, kies aŭtorino Teresa Nemere kaj kunlaborantaj lokaj esperantistoj meritas gratulojn pro la arto krei laŭdindan kaj imitindan Esperanto-etoson.

raportis: Jerzy A. Walaszek

Czesław Baranowski

Preskaŭ ĉio pri la prepozicio „AL”

Estas sciate, ke Esperantaj prepozicioj estas sekvataj preskaŭ ĉiam de nominativo. Al aparta grupo de senakuzativaj prepozicioj apartenas: **al, ĝis, de, el**.

Mi intencas nun okupiĝi pri la prepozicio **al**, kiu ja estas tre ofte uzata de esperantistoj. **Ĝi neniam indikas lokon, sed estas montranta:**

1. Fizikan proksimiĝon en ia direkto.

Ekz.: Somere multaj feriantoj veturas **al** Mielno. Mi kutimas rapide iri **al** la lernejo. Mi estis veturanta **al** mia patrino. La riveretoj fluas **al** riveroj. Vespere la suno kliniĝas **al** la okcidento. Dum vintro–sezono **al** multaj vilaĝanoj venas mizero.

Nun de loko flugu ĝi **al** loko (Z). De tempo **al** tempo (Z). De tago **al** tago.

Rimarko: La prepozicio **al** montras nur la celadon al iu loko, dum akuzativo povas enhavi en si ankaŭ la atingon de la celo. (Morgaŭ mi veturos Varsovion).

2. Direkton aŭ celon de ia movo aŭ fizika ago.

Ekz: Mi prezentis la revuon „Pola Esperantisto” **al** eksterlandaj gesamideanoj. Mi etendis la manojn **al** ploranta knabo. Leterportisto ofte frapas **al** mia pordo. Ŝi turnis sin **al** mi kun granda peto. Mi senprokraste respondis **al** ŝi. Tiu ĉi vojeto kondukas **al** la strando. Jen estas enirejo **al** mia domo. Tra la fenestro mi ofte rigardas **al** la strato. Diru **al** mi, kiel vi fartas? Kial vi ne respondas **al** mi. Mi instruas Esperanton **al** miaj gelernantoj. Ŝi pretervole disrompis la vazon **al** pecoj.

Rimarko: La prepozicio **al** montras iafoje la staton rezultantan de la movo.

3. Celon de ia sento, penso aŭ volo.

Ekz: Mi deziras **al** vi sanon, feliĉon kaj prosperon. Ĉu minacas **al** ni baldaŭa disiĝo?

Pardonu **al** mi mian longan silenton. En la koro mi ĉiam portas amon **al** vi. Ni ja korinkliniĝis unu **al** la alia. Vi montris grandan entuziasmon **al** Esperanto. Ne estu tro severa **al** mi. Mi ofte sopiras **al** la urbo de mia infane-

co. En ĉiu homo naskiĝas kompatato **al** senhejmuloj.

4. Atribuon, destinon, apartenecon.

Ekz.: Patrino donis pomon **al** sia filino. Mi proponis **al** ŝi feriadon en Mielno. Donu **al** mi vian adreson aŭ sendu **al** mi emailaĵon. Ĉu vi povas imagi **al** vi mian embarason? La aŭto apartenas **al** mia patro, sed ĝi estas nun **al** mia dispono. La nova kostumo bonege konvenas **al** vi. La Kreinto de Esperanto akiris **al** si bonan gloron. En la mondo oni starigis **al** L. Zamenhof multajn monumentojn.

5. Profiton aŭ malprofiton ricevan per la ago.

Ekz.: Detranĉu **al** mi pecon da pano. Mi ne povas samtempe servi **al** du sinjoroj. Ĉu vi pretas lavi **al** mi la piedojn? Ŝi faris **al** si belan puloveron. Li plantis **al** si en la ĝardeno belajn arbutojn. Kantu aŭ deklamu **al** mi ion en la lingvo internacia.

6. Daton, ĉe kiu oni faras ion.

Ekz.: Dankon por via amika sendaĵo **al** mia naskiĝtago. Koran dankon por via gratulo **al** la datreveno de mia naskiĝo. **Al** la komenciĝonta nova jaro mi sendis **al** miaj geamikoj multajn bondezirkartojn.

7. Adicion, kompletigon.

Ekz.: Aldonu kvar **al** kvar por ricevi ok. Oni devas aldoni iom da acido **al** la miksaĵo.

Vi aspektas belege, kvankam aldoniĝis **al** vi jaroj da vivo.

8. Gramatikan rilaton inter agsubstantivo kaj ties objekta suplemento.

Ekz.: En nia lando estas videbla estimo de homoj **al** la tradicio. Dum la kunveno li faris ofendon **al** mia amikino. Akcepto de gastiganto **al** gasto devas esti bonkora. Dronanto vokis **al** mi por helpo. Li alvokis **al** si la dek du disĉiplojn (Z). Vivi kun timo **al** Dio en sia koro (Z).

9. La prepozicion al oni povas renkonti ankaŭ en la jenaj esprimoj:

afabla **al** iu, danka (maldanka) **al** iu pro io, favora **al** iu, inklina **al** io, surda **al** ies peto, senti abomenon **al** iu, esti agrabla **al** (por) iu, fari agrablajn **al** iu, esti antipatia **al** iu, simila **al** (iu, io), najbara **al** (iu, io), spite **al** (iu, io), dank' **al** (iu, io) .

RIMARKOJ

1. La prepozicio **al** estas uzata memstare kun konvenaj sufiksoj kaj finaĵoj: **aligi** (aldoni, almeti), **aliĝi** (aldoniĝi, almetiĝi), **aliĝilo** (por aliĝi al io), **alajo** (io, kio estas aldonita al io).

2. La prepozicio **al** funkcias ofte kiel prefiksoido, **ekz.:** alparoli, almezuri, alproprigi, alveni, alglui, alkonduki, aldoni, alskribi, alpagi, allasi, alĝustigi, alĉutimiĝi.

3. En Esperanto troviĝas pluraj alprepoziciaĵoj, t.e. adverboj kun prepozicioj, havantaj prepozician funkcion: danke **al** (dank' **al**), favore **al**, honore

La revivigo de Zamenhof

La Zamenhof-strato

Lazaro Ludoviko Zamenhof, kiun la esperantistoj nomas „la Majstro”, estas la plej konata ano de la familio Zamenhof. Pli videbla, ĉar reale ekzistanta, estas lia nepo, ankaŭ nomata Ludoviko. Oficiale li nun nomiĝas Louis Christophe Zaleski-Zamenhof.



⇒ **al**, fronte **al**, kompanse **al**, konsidere **al**, proporcie **al**, proksime **al**, vidalvide **al**, renkonte **al**, responde **al**, rilate **al**, prepare **al**.

En la Proverbaro Esperanta prilaborita de L. Zamenhof troviĝas multaj proverboj kun la prepozicio **al**.

Jen kelkaj proverboj, kiujn oni povas facile ellerni parkere:

Ankoraŭ neniu plaĉis **al** ĉiu.

Akvo kaj pano servas **al** sano.

Eĉ bagatelo povas servi **al** celo.

Al la papero ne mankas tolero.

Fremda doloro ne kondukas **al** ploro.

Kio iras el koro, venas **al** koro.

Malfermita kelo tentas **al** ŝtelo.

Ne helpas ploro **al** doloro.

Ne venos rato mem **al** kato.

Mankis **al** Petro klopodoj, li aĉetis **al** si domon.

Vorto dirita **al** mondo apartenas kaj neniam revenas.

64 **Al** tiu ĉio cedas, kiu monon posedas.

La partoprenantoj de lastaj Universallaj Kongresoj de Esperanto (UK) memoras lin kiel tre ĉarman personon, kiu ofte faras sagacajn, stimolajn paroladojn. Tiu ĉi libro unuafoje pli detale prezentas lin, lian vivon, liajn pensojn. Roman Dobrzyński, konata ĵurnalisto, proksimigas la nepon al ni en la formo de intervjuo. Ili komencis interparoli en 1993 en Litovio, helpe de bongusta loka miel-likvoro. La unua rezulto estis la libro *Ulica Zamenhofska*, kiu aperis en 2001. Du jarojn poste sekvis tiu ĉi pliampleksigita Esperanta eldono.

Esperanto ne estis metita jam en la lulilon de Ludoviko. Sed en 1934 la gepatroj ruze promesis kunpreni lin al la UK en Stokholmo, se li, tiam 9-jara, lernas la kongresan lingvon. Li tion faris — kaj iĝis „kongresa atrakciaĵo, alloga fotoobjekto”. Preskaŭ neeviteble, li mem kaptiĝis de la esperantista etoso. Sekvis la partopreno en pliaj kongresoj, en Romo kaj Vieno. Kiam en 1937 la UK okazis en Varsovio, Ludoviko ne povis scii, ke tie li lastfoje ludis la rolon de „eta princo” en Esperantujo. Du jarojn poste germanaj trupoj invadis Pollandon. Jam malmultajn tagojn post la okupo de Varsovio, la 4an de oktobro 1939 anoj de la nazia sekureca servo arestis Adam Zamenhof, la patron. Verŝajne en januaro 1940

li estis ekzekutita. La filo diras: „Neniam mi povis liberiĝi de la konvinko, ke pro sia nomo pereis mia patro”. Li estas konvinkita, ke la familio Zamenhof troviĝis sur preparita speciala listo, ĉar la familianoj estis arestitaj, ĉe diversaj adresoj, ĉiuj la saman tagon.

En aŭtuno 1940 estis formita en Varsovio, sur teritorio de nur iom pli ol tri kvadrataj kilometroj, getto, kiu komence kunigis 350.000 judojn, poste eĉ pli. Ankaŭ Wanda, la patrino, kaj Ludoviko enpremiĝis en la varsovian getton. De tie du filinoj de la Majstro, Zofia kaj Lidja, estis en aŭgusto kaj septembro 1942 transportitaj al la neniigejo Treblinka. Tiu sorto ankaŭ minacis al Ludoviko, sed dank’ al feliĉa hazardo li sukcesis eskapi de la *Umschlagplatz* (transŝarĝa placo) kaj reveni unue al la getto, antaŭ ol li kaj la patrino dank’ al falsaj identigiloj (laŭ kiuj li nomiĝis Krzysztof Zaleski) povis sin kaŝi ekster Varsovio. Ĝis la fino de la nazia reĝimo li havis vivon, kiu ĉiutage pasis ĉe la rando de morto.

Pri la varsovia getto ekzistas abunda literaturo. Ĝuste ĉar ĝi estis surtera infero, atestoj de transvivintoj tamen troviĝas nur en limigita nombro. Tial la memoroj de la nepo estas spirhaltige interesa legaĵo. Min ili memorigas pri la aŭtobiografio de alia eskapinto el la varsovia getto, la kritikisto Marcel Reich-Ranicki. Lia libro *Mein Leben* (Mia vivo) en 1999/2000 furore vendiĝis en Germanio.

La libro de Dobrzyński havas la titolon „Zamenhof–strato”. La n–ron 9

de tiu strato en Varsovio iam portis la domo, en kiu loĝis Lazaro Zamenhof. En 1942/43 la strato kondukis centmilojn da judoj en la direkton de vagonaroj al Treblinka. Pri tio enkonduke memorigas la nepo, kaj li lige kun tio esprimas la esperon, ke „virtuala Zamenhof–strato” konduku la homaron al toleremo, al kompreno, al frateco. La postaj ĉapitroj priskribas la vojon, kiun la intervjuito iris post la milito. Li studis la konstruingenieran sciencon, doktoriĝis kaj, post sia translokiĝo al Francio, komencis imponan profesian karieron, dum kiu li tutmonde akiris reputacion kiel specialisto pri pontoj kaj artefaritaj insuloj. „Prembetono fariĝis parto de mia vivo...”, li rakontas.

Kun plezuro oni legas la memorojn de la nepo pri vojaĝoj al ekzemple Brazilo kaj Japanio, la enŝovitajn anekdotojn kaj diversajn trafajn komentojn pri la forpasinta komunisma sistemo kaj pri nia nuna mondo. Ni multon lernas pri la historia fono de Esperanto, al kiu estas tiom ligita ankaŭ la persono de Zaleski–Zamenhof. Apartan intereson sendube trovos la klariĝoj pri la rilato de la avo al cionismo kaj pri la demando, al kiuj – judoj, poloj, rusoj, litovoj – Lazaro Zamenhof sentis apartenon. Simile kiel la granda pola verkisto Adam Mickiewicz, devenanta el la sama naskiĝregiono, li okaze emfazis sian ligitcon al la litovoj. Sed fakte ambaŭ estis la kontraŭo de malvasta pensado laŭ naciecaj kategorioj. Ili, klarigas Zaleski–Zamenhof,

fakte „meritas apartenon al la tuta homa gento”.

Kvankam mi mem estas mezeŭropano, mi devas konfesi, ke mi ĝis nun ne legis tiel klaran kompaktan prezenton de la signifo, kiun kun sia plurismo de lingvoj kaj religioj havis la Litova-Pola Regno en la historio de orienta Eŭropo. Tiu regno “ne konis persekutojn pro nacieco, ne suferis interreligiajn militojn, ne establis inkvizicion, nek bruligis sorĉistinojn”. Kvankam ĝi estis en 1795 dispartigita de la najbaraj potencoj Rusio, Prusio kaj Aŭstrio (kaj baldaŭ sekvis kontraŭjudaj pogromoj), ne estas hazarde, ke ĝuste en unu angulo de tiu mondparto, en Bjalistoko, en 1859 naskiĝis la aŭtoro de Esperanto. Tute prave lia nepo atentigas, ke la iama unio de Pollando kaj Litovio povas esti konsiderata pramodelo de la eŭropa integriĝo.

Tra la tuta libro historiaĵoj reviviĝas, akirante gravecon por la nuntempo. Tiel eblas transponti la distancon inter historio kaj nuntempo. Kion la avo iam celis, tio laŭ la nepo konservas validon. Krom kompreneble Esperanto, ankaŭ la ideoj de la Majstro pri proksimiĝo de nacioj kaj religioj restas aktualaj kaj parte jam trovis konfirmon, ekzemple en la Deklaracio pri Homaj Rajtoj kaj la Eŭropa Unio. Pri tio inspire rememorigas la nepo, la projektinto de pontoj, kiu, nun pensita, konvinke pledas por la konstruado de multaj „pontoj de l’ espero”. Kiu povus pli kredinde proponi tion ol ido de Lazaro Zamenhof, ol homo, kiu rigar-

dis en la abismon de homa malbono, sed ne ĉesis konservi sian fidon al pli bona homaro?

Ulrich Lins



La Zamenhof-strato

Tuj post la 88a Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo privata kuriero, mia samklubanino Leena Tiusanen enmanigis al mi en la flughaveno de Turku tute freŝan furorlibron sub la titolo „La Zamenhof-strato” de Roman Dobrzyński. Jam anticipe mi eksciis interesajn informojn pri la menciita verko dum la elsendoj de Pola Radio. En aŭtobuso survoje el la aerodromo al la urbocentro mi komencis foliumi la novan trezoron. Be-la ekstera aspekto, fortika bindaĵo kaj flua stilo kaptis min kaj mia febro por starti legadon ege kreskis. La unua rigardo katenis min senaverte kaj mi estis konkerita. Sango en miaj vejnoj ekfluis pli varme kaj pli rapide ol kutime. Entuziasmo videble kreskis.

La libro estas konstruita sur interparoloj de du viroj — verkisto Roman Dobrzyński kaj d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof, la Nepo de la kreinto de Esperanto. Al mi tre plaĉas tiu ĉi maniero trakti aferojn. Ŝajnas klare, ke ĝi faciligas la legadon. Kompreneble ankaŭ la flua stilo efikas tiudirekte. Vera surprizo estis ekscii pri multaj, tute novaj aferoj koncerne la fazojn kaj spertojn de la Zamenhofa familio. Detala indekso, multnombraj notoj pri fontoj kaj riĉa listo literatura servas le-

gantojn. Spontane sentiĝis dankemo pro tio, ke ni nun havas neforgeseblan, valoran materialon libroforme je ĉies dispono laŭdezire. La laboro surpaperigi ĉion estis vere giganta kaj postulis multajn jarojn. Forta persistemo estis nepre necesa. La situacio ja estis malfacila, ĉar la ĉefroluloj loĝis en Varsovio kaj en Parizo. Tamen ili atingis la celon en gloro kiel diras iu poeto. Kaj redaktoro Dobrzyński kaj d-ro Zaleski-Zamenhof meritas tutkoran gratulon.

La libro havas entute 288 paĝojn kaj ĝi estas presita somere 2003 en la litova urbo Kaunas. Varman manpremon ni ŝuldas ankaŭ al la respondeculoj en la eldonejo Ryto Varpas pro rapide, sed tamen diligente plenumita faka laboro tiel, ke al la kongresanoj malfermiĝis ebleco havigi al si freŝbakitan produkton en Svedio.

El abundaj kortuŝaj detaloj eblas mencii ĉi tie nur unu ekzemplon. „Umschlagplatz” en Varsovio estis loko, el kiu foriris trajnoj al la ekstermejo Treblinka — ĉiutage miloj da homoj, ekstreme elĉerpitaj, malsanaj kaj malsataj. Mankis eĉ akvo. En tiuj kondiĉoj homoj amase mortadis. La kadavroj estis tuj fortransportataj al proksima juda tombejo ĉe la strato Okopowa. Oni uzis por tiu celo specialajn ĉarojn. Sur tiuspeca ĉaro la Nepo revenis el la infero... neatendite aliris lin d-ro Jan Frenkler. Li estis amiko de la Zamenhofa familio. Subite li puŝis la Nepon sur la preterveturantan ĉaron kun kadavroj. En la juda

tombejo la tuta ŝarĝo estis lasita teren kune kun la Nepo kaj neniu rimarkis, kiam li leviĝis kaj foriris.

La lasta ĉapitro en la verko nomiĝas „La Ponto”. En ĝiaj kadroj la aŭtora duopo dialogas tuŝante larĝajn perspektivojn pri la mondlingva situacio kaj pri ĝia evoluo ĝenerale. Talentaj spertuloj konas la terenon, sur kiu ili moviĝas. Unufoja legado ne sufiĉas, necesas plurfoje reveni al detaloj. Faciligas la ripetadon la struktura bazo utiligata en la libro, kiun oni povas sur kiu ajn paĝo malfermi kaj sukcese tuj reenprofundiĝi en la problemojn. Ordinara leganto kiel mi ne kapablas profesiece prezenti kaj recenzi la enhavon, sed unu afero estas tute klara: indas legi kaj relegi la kreaĵon de la pola-franca duopo, kiu riĉigos ĉiujn uzantojn de la Internacia Lingvo Esperanto. Jen estas por vi taŭga, inda kunulo por aŭtunaj vesperoj ĉe legolampo en komforta fotelo.

Jorma Ahomäki
jorma.ahomaki@luukku.com



La Zamenhof-strato

Mi havas grandan plezuron traleginte libron „La Zamenhof-Strato” de Roman Dobrzyński, verkitan en stilo de intervjuo-rivero kun d-ro L. C. Zaleski-Zamenhof, nepo de Ludoviko Zamenhof, kreinto de la internacia lingvo Esperanto. Libro tre interesa, leginda al ĉiu esperantisto kaj ne nur. Interparolas du konataj personoj pri gravaj, ĝenerale homaj problemoj

kaj en ligo kun Esperanto. Ĉiuj konstatoj kaj opinioj estas tre interesaj. Mi akceptas ilin kaj aprobas despli, ke tu-ta libro estas verkita en glata kaj facile legebla stilo. Nur opinio de d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof koncerne la XXI jarcenton, ke ĝi alportos plibonigon de vivkondiĉoj por la homaro (paĝoj 216–217), estas laŭ mi tro optimisma. Mi forte dubas pri tiel optimismaj esperoj.

Victor Hugo, la franca verkisto de la XIX jarcento, same entuziasme kaj optimisme en sia romano „Les Misérables” profetis koncerne la XX jarcenton. Li antaŭvidis la XX jarcenton feliĉa, sen sangaj rivaladoj inter la popoloj, sen tiranismo, malsato kaj mizero. Sed ĝuste ni vivis en la XX jarcento, konas ĝian historion, kaj ni povas konstati kiel grandan eraron faris Victor Hugo en sia profetaĵo. Liaj optimismaj revoj ne plenumiĝis.

Mi timas, ke la samo verŝajne okazos koncerne la optimismajn revojn de d-ro L. C. Zaleski-Zamenhof.

Tutcerte en la XXI jarcento estos senkompara progreso de ĉiuj sciencoj, kiuj povus servi al la bono de la homaro. Sed ĝenerale homo ne ŝanĝas sian naturon, homa egoismo plu daŭros. Sataj riĉuloj ne dividos iliajn havaĵojn por parton redoni al malriĉuloj. Kiu multe havas, volas ĉiam pli, kaj la mizero en la mondo senĉese kreskas, ankaŭ senlaboreco. En tia situacio konfliktoj, militoj kaj terorismo senĉese daŭras, kaj daŭras tiom longe, kiom longe sur la tero estos homoj malsataj.

Tamen riĉaj ŝtatoj ne intencas serioze likvidi malsaton. Moderna tekniko laboras por konstrui pli perfektajn armilojn de detruo, por milito, kiu estas pli ekonomia por riĉa Nordo ol vera likvido de malriĉeco kaj malsato en la Sudo.

Krom tio ekologia stato de nia tero ankaŭ ne estas bona. Malgrandiĝantaj rezervoj de trinkakvo estas granda minaco por la homaro.

Kia do estos la XXI jarcento, multaj el ni — kiuj travivis la XX jarcenton — jam ne ekscios. Estus tre bone, se optimismaj perspektivoj por la XXI jc. realiĝus laŭ opinio de d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof. Sed ĉu tiel okazos, pritaksos la venontaj generacioj.

Władysław Burszta



„Maigret kaj la maljuna damo”, krimromano verkita de Georges Simenon.

Heroo de la detektiva, psikologia-morala krimromano, komisaro Maigret (traduku: Malgrasulo), estas flegma kaj kvazaŭapatia pariza policisto preferanta bone ekmanĝi kaj ofte „honeste” ekdrinki, neniam disiĝante kun granda pipo per kiu fumegas kiel lokomotivo.

Supozeble aspekto de la komisarero, estas senduba aŭtoportreto de la aŭtoro — Georges Simenon, kiu dum kvindek jaroj de sia plej aktiva literata vivo kreis pli ol 500 romanojn, plej ofte litigitajn kun lia profesia laboro, kiel ĵurnalisto en la krimfako de loka po-

licejo. Detektivaj labormetodoj de la Maigret ŝajnis tiutempe strangaj, bizarraj kaj eĉ ekstravagancaj. Li ne deduktas laŭtradicie, surbaze de trovitaj papilaraj fingrospuroj, forŝiritaj butonoj aŭ cigarstumpoj. Antaŭ ĉio interesas lin socia medio, ĉirkaŭanta viktimon de la krimo. Li deziras kompreni kaj eksenti atmosferon de la medio, detale penetrante simpatiojn kaj antipatiojn, koligaciojn kaj reciprokajn interesojn, ligantajn la homojn, kiuj vole ne vole ĉirkaŭis kaj rilatis al la viktimo.

La maljuna damo (nobeligita per fortune de ŝia edzo al la titolo: damo) estas unua „senkulpa” kaj ekster la krimaj supozoj do multe da tempo kaj intuicio devis dediĉi la komisararo al aliaj potencialaj krimuloj, por trovi veran aŭtoron de la preskaŭ „perfekta krimo”. Kaj fine kiam ĉiuj interpersonaj ligoj ĉesos esti vualitaj, kiam la komisararo estas kompreninta kiu kiun malamis kaj pro kio, tiam solvo de la krimenigmo restas problemeto de kelkaj rutinaj operacioj.

Krimenigmo nedisigeble interplektiĝas en romano de Simenon kun psikologia enigmo, kiun kaŭzas konfliktaj aspiroj kaj bezonoj de la viktimkrea ĉirkaŭantaro.

Ni permesu tamen, al scivola leganto, eniri la misteran mondon de la romano, kie li renkontiĝos kun ĉiutagaj problemoj de la provinca vivo en dormanta ĉemara urbeto Etrete. Sendiskute, ĉiu leganto devas streĉi sian imagon kaj post la unua ĉapitro intelektu ripozi kelkajn horojn aŭ tagojn.

Legado de tiel multaj kaj ŝanĝiĝantaj pensfadenoj lacigas averaĝan leganton, sed poste bone preparas lin gvidi konversaciajn forumojn kaj progresigas alian pensadon.

Generale dirante aperigo de la klasika krimromano ne nur riĉigos Esperanto-bibliotekojn per beletraĵo tradukita en 50 lingvojn, sed instigos Eldonejon „Sezonoj” aperigi sekvontan libropozicion de la mondkonata franca ĵurnalisto George Simenon. Legi, kompreni kaj travivi, jen la ĉefa rezulto kiun atendis kaj la Aŭtoro kaj la Eldonejo.

Jerzy A. Walaszek



Estimata Redaktoro,

Estis por mi agrabla surprizo legi sur la frontpaĝo (PE n-ro 1/2004) mian epigramon publikigitan antaŭ 37 jaroj en „Tamen”. Koran dankon! Bedaŭrinde la lasta vorto de la epigrama aperis erare kiel „celitan” anstataŭ „ĉelitan”. La manko de la supersigno senigas la epigramon de ĝia konkluda poento. Permesu citi la originalan varianton de mia juneca verketo:

Ni sidas sentaŭge, sence rezonas.

Forlasu ĉi tiun rondeton elitan!

La fortojn pli junajn movado bezonas.

Ni iru la vojono ĉelitan!

Mi ankaŭ profitas la okazon por korekti erarojn, kiuj miakulpe enŝteliĝis en la artikolon „Ada — la migranta birdo”. En la paĝo 9. estis uzita la vorto „malliberigo” anstataŭ „liberigo”.

Devas esti: „Generalo W. Sikorski (...) sukcesis konvinki (...), ke la kondiĉo de helpo al Sovetunio estu **liberigo** de la polaj deportitoj.” En la paĝo 10 estas misuzita la vorto „vojo” anstataŭ „volo”. Devas esti: „Trompi la lastan **volon** de la mortinto estas fia ago”.

Por ke mi ne estu la sola kulpu-
lo, mi atentigas pri kelkaj aliaj lingvaj
eraroj sur la paĝoj 6 kaj 7: „Pro man-
ko de financaj rimedoj **oni ne eblis**
(devas esti: ne eblis) laborigi tajpist-
inon”; „La asocio (...) profitis de tio,
disvolvigante (devas esti: divolvante)
plurkampan...”; „Li ne **ĉesis** (devas
esti: ĉesigis) **kontaktojn...**”. En la paĝo
26 estas trovebla jena eraro: „...polaj
samideanoj (...) **haltigis** (devas esti:
haltis) en Venecio”.

En la paĝo 27 oni trovas malko-
rektan frazon: „Oni provis **sanktigi**
la alkoholon”. Tiu ĉi polismo estas ta-
men pardonebla kiel „litentia poe-
tica” en la amuza „Neoficiala raporto
pri GRUPE-7”, en kiu oni interalie po-
vas legi: „La nomon ‘Sangria’ oni pro-
vis esperantigi al ‘Sankta Grijo’. Neniu
tamen konis ĉi ulon, Grion.” Marian
Zdankowski, aŭtoro de la neoficia-
la raporto ŝatas paroli kvize. Tiamaniere
li ankaŭ raportis pri preleganto,
kies „la plej ŝatata temo estas ĉiam la
sama. Li rakontis pri si mem”. Jen sol-
vo de la kviza demando: „Tiu persono
estas mi”.

Al tiu ĉi malkovro instigis min la
deziro esti absoluta rekordulo de la
n-ro 1/2004 de „Pola Esperantisto”, en
kiu mia nomo aperis eksplicite kvarfo-

je kaj kaŝite unufoje. Restas al mi dan-
ki la Redaktoron, ke Li decidis kumu-
li en unu numero artikolojn verkatajn
sinsekve dum duono da jaro.

Roman Dobrzyński



Falsaj pensoj de sinjoro Wł. Burszta

Legante artikoleton skribitan de
Wł. Burszta en la 1a numero de „PE”-
2004 mi kun miro rimarkis, ke aŭtoro
riproĉas al papo Johano Paŭlo la dua,
ke li ne apogas Esperanton. Mi ci-
tas: „Se papo estus favora al Esperanto
tiam li ordonus, aŭ almenaŭ rekomen-
dus, instrui Esperanton en porpastraj
seminarioj...”

Mi tute ne konsentas kun opinio
de Wł. Burszta, ĉar tasko de Romka-
tolika Eklezio estas tute alia ol apo-
go de Esperanto. Tasko de ĉiu eklezio
en la mondo estas alpeli ŝafaron al sia
ŝafejo eĉ tiun misirintan. Kiamaniere
faros tion la paŝtistoj, ĉu per Esperan-
to aŭ sen ĝi, dependas de ilia elekto kaj
sperto. Same agas la papo.

Sed tre grava por esperantistoj estas
tio, ke la papo faras tion ankaŭ per
Esperanto. Li, ĉefo de unu el plej gran-
daj mondaj religioj, traktas Esperan-
ton ne kiel artefarita lingvo, sed kiel
normala vivanta lingvo. Ĉu tio ne estas
iusence apogo de Esperanto?! Pro tio,
ni – esperantistoj, devas danki al la pa-
po Johano Paŭlo la dua. Se tion, kion
rimarkis la papo, rimarkus aliaj gra-
vuloj de la mondo, la mondo verŝajne
alie aspektus hodiaŭ.

Aleksander Zdechlik

Ne „aŭ-aŭ”

P.E. Nro 1/2004 paĝo 19.

Ĝusta estas via skribenda majuskle Esperanto. Oni skribas nomojn de iamaj forpasintaj lingvoj: Novialo, Okcidentalo, Volapuko, Ido, sed ne estimas Esperanton.

Nomo estas skribata majuskle kaj ĝia radiko ne ŝanĝiĝas. Vortaroj kaj gramatikoj konsilantaj skribi: „aŭ minuskle — aŭ majuskle” erarigas lernantojn. „Aŭ-aŭ” sugestas, ke la vortoj signifas la samon.

Ne estas la samo: putino kaj Putino. Ne estas la samo: esperanto kaj Esperanto. Simile kiel en via ekzemplo: e-letero kaj E-letero:

esperanto = persono, kiu esperas,

Esperanto = nomo de la lingvo.

esperanta libro = sen senco, ĉar libro ne esperas,

Esperanta libro = libro skribita en la lingvo Esperanto,

esperante eldoni = esperi pri eldono,

Esperante eldoni = eldoni en la lingvo Esperanto.

Ĉu ne estus utila korbo sur la lasta paĝo de ĉiu numero de P.E. por ĵeti al ĝi erarajn vortojn tie trovatajn? *)

Oni ofte uzas erarajn „kutimaĵojn”, ne pensante pri ilia signifo.

Post 117 jaroj estas jam tempo klare decidi kio estas ĝusta kaj kio ne.

Danuta Kowalska

*) Kiu decidus, kion meti en la „korbon”? [red]

Nova Ĉefa Estraro de PEA

Antaŭ kelkaj tagoj en la urbo Łódź (centro de Pollando) okazis la raporta-elekta kunsido de delegitoj de PEA.

Oni pridiskutis la pasintan trijaran periodon de la agado, problemojn kiujn oni solvis kaj kiujn ne sukcesis solvi. Oni diskutis pri estonteco de la Esperanto-movado en nia lando, substrekante speciale fortan kunlaboron kun junaj grupoj. Post kelkjara stagnado ni jam atingis vojon de stabila agado.

En la strukturoj de PEA estas 21 filioj en diversaj partoj de Pollando. En filioj nun oni devas plifortigi kunlaboron kun lokaj medioj (ĵurnalistoj, radiostacioj, TV) por promocii la ideon de Zamenhof, por promocii nian lingvon.

PEA volas kunlabori kun kelkaj Esperantaj grupoj kiuj agas en Pollando ekster la strukturoj de PEA por komunaj celoj. Ni certas, ke tiu kunlaboro plifortigos la signifon de esperantistoj en nia lando.

Dum la kunsido estis elektita nova 9-persona Estraro de PEA.

Prezidanto — Stanisław Mandrak (Gliwice), vicprezidanto — Edward Kozyna (Malbork), vicprezidantino — Ewa Misior (Warszawa), sekretario — Jerzy Walaszek (Sosnowiec), kasisto — Aleksander Zdechlik (Zabrze), membroj: instruado, edukado — Danuta Zelińska (Gliwice), kunlaboro kun junularo — Zofia Śmistek (Łódź), anoj — Jadwiga Wasiuk (Pelplin), Bożena Gierula (Bielsko-Biała).

Revizia Komisiono:

Prezidantino — Elżbieta Kębłowska (Łódź), Zbigniew Tylkowski — (Starogard Gdański), Andrzej Kiszkiel — (Zielona Góra).


Stanisław Mandrak

Keyman — Esperanta klavaro

La programo de la aŭstralia firmao Tavultesoft (www.tavultesoft.com) estas utila instrumento por homoj, kiuj volas skribi Esperantajn literojn kun supersignoj. **Keyman** estas senpaga programo por privatuloj — firmaoj kaj institucioj devas pagi licencon.

Post instalado **Keyman** estas lanĉata dum starto de la sistemo Vindozo. Komence ĝi enhavas neniajn klavarojn do vi devas elŭti ilin el la interreta paĝo de Tavultesoft — www.tavultesoft.com/keyman/downloads/keyboards/ — kie vi trovos **Esperanto Cx**-programon de Gyula Zsigri.


La ikono de **Keyman** kaj ĉiuj instalitaj klavaroj aperas en la sistema menuo de Vindozo...



...kaj la liston de klavaroj vi vidos en la Tavultesoft Keyman Configuration — Keyboards.

Se vi volas aktivigi la klavaron ne nur per muso sed ankaŭ per klavaro, vi povas difini klavkombinaĵon por ĝi, ekzemple Ctrl+Shift+Alt+E. Kompreneble tiu ĉi operacio ne estas necesa por ke la klavaro laboru — vi povas selekti la klavaron nur per muso.

Skribante ian tekston vi elvokas Esperantajn literojn per kombinaĵo „latina litero —



x”. Ekzemple, por ricevi la literon „ĉ” skribu unue „c” kaj poste „x”. Keyman tuj ŝanĝos ilin en „ĉ”.

Memoru, ke Esperantajn literojn oni povas skribi en programoj akceptantaj tiel nomatan Unikodan sistemon, kiel Word, OpenOffice, Notepad, WordPad, FrontPage, MS Outlook, Outlook Express, Mozilla Composer, UniRed (unikoda tekstoredaktilo de Jurij Finkel — www.esperanto.mv.ru/UniRed/).

Kaj kiel ekzemplo fragmento de dokumento skribita en la programo Microsoft Word, kie troviĝas literoj el tri alfabetoj — Esperanto, Farsi kaj la Kartvelia:

Esperanto

Ĥoŝanĝo ĉiujatide

Farsi

من بوٹضز لکجه گفدس اپءئقشعرتی

Kartvelia

ლჯუკუნ გმწუ ფძვთა პროლ ჭყსმ იტ